

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 533

MARTO 1950

E.P.C. prezentas

## BRULANTA SEKRETO

kaj aliaj rakontoj

de STEFAN ZWEIG

tradukitan de K. R. kaj P. E. Schwerin

Ĉiu el la kvar rakontoj estas streĉa elmontro de la interplekto de homaj emocioj, kaj malkaŝas profundan komprenon pri la psikologio de la individuo. Libro memorinda.

Ĉi tiu estas EPOKO-LIBRO n-ro 9

Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



# ANONCETOJ

*Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duobla vorto.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Sindikata oficisto** deziras korespondi per il. p.k. kun gesamideanoj tutmondaj. S-ro Stan. Martyniak (Okr. Zarz. Zw. Zaw. Metal.), Bielsko n/Sl., 1-go Maja 47, Pollando.

**Muzikinstruistino** deziras korespondi pri muziko kun muzikgeinstruistoj. Interŝanĝas muziknotojn. S-ino Maria Sluzalek, Bielsko n/Sl., Mickiewiczza 30, Pollando.

**Mi deziras korespondi pri filmoj.** Mi posedas tre interesan (propran) scenaron pri alkoholismo. Volonte mi kunlaboros kun filmistoj. S-ino M. Otylia Królowa (vidvino), Bielsko n/Sl., Dabrowskiego 14m. 2, Pollando.

**Gimnaziaĝ gelnarantoj :** 16-jara F-ino Urszula kaj ŝia 14-jara frato Leszek deziras korespondi kun la tutmondaj gekolegoj, precipe el Nov-Zelando, Japanujo kaj Aŭstralio. Skribu al : Urszula kaj Leszek Miedzybrodzki, Biala Krakowska, Mikolajka Reja 10, Pollando.

**Oni serĉas s-ron Kazimierz Głinski,** nask. la 19an de Aprilo 1897 en Mistek (Ĉeĥoslovakujo), kiu en la jaroj 1928-29 troviĝis ĉe The Central Luzon Milling Company Inc. (Central Azucarera del Centro de Luzon), Bambang, Tarlae, Phillipine Islands. Sciigojn bv. direkti al S-ino Helena Głinska, Wrocław 14, pl. Prostoklatny 8 (Szk. Pielegn.), Pollando.

**Ne-katolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage per la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo : Fraterhuis, Loonopzand (N. Br.), Nederlando.

**Por propaganda celo** mi deziras ricevi de la tuta mondo ilustritajn poŝtkartojn bele afrankitajn sen koverto. Ĉiam respondos. Jean Requillard, A. la Croix Moreau, Vierzon (Cher), Francujo.

**Virina tajlortrancisto** interesiĝas pri novaj virinvestranĉoj tutmondaj. Danovski Vaclav, Chmielna 28, Warszawa, Pollando.

**Serĉataĵ :** Historio de la lingvo universala (Couturat, Drezon), Mitridates (Adelung — lingvara traktato), Discussiones (Peano) kaj Progreso (Couturat, 1908-11). D-ro Zeballos Morales, Fray Marcos, Urugvajo.

**C. Verwer,** Raadhuisstraat 21, Breda, Nederlando volas interŝanĝi il. pk. aŭ leterojn kun la tuta mondo kaj interŝanĝi pm. laŭ kvanto kun Eŭropo.

**Profesoroj, instruistoj, studentoj** kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas je monda kultura unuigo, skribu al la World University Round Table, 6711 Sunset Boulevard, Los Angeles 28, California, Usono. Ili ricevos informojn senpage. Referu ĉi tiun anoncon.

**Kun matematikinstruistoj** deziras interŝanĝi maturitec-ekzamenajn taskojn el ĉiuj landoj Joel Vilkki, Somero, Finnlando.

**Gejunuloj.** ni invitas vin pasigi 3-4 semajnojn senpage ĉe ni somere (julio-aŭgusto) 1950 : Licec, Somero, Finnlando. Skribu tuj !

**Letervesperon** ni aranĝos la 21-4-1950. Al ĉiu respondon kaj senpagan bildprospekton pri la pasioludoj. Adreso : Esperantoklubo, Bad Kohlgrub (ĉe Oberammergau), Haus Edelweiss, Germanujo.

**Letervesperon** en Marto aranĝas la Epernaya Grupo ; nepra respondo. Skribu amase al S-ro Beauchart, lernejestro, 47, Rue de l'Hôpital, Epernay (Marne), Francujo.

**Filatelistoj !** Sendu al mi 50 poŝtmarkojn, mi sendos reciproke 50 pm. de Pollando. Z. Kuśmider, Piekna 5/1, Pabianice, Pollando.

**Overseas Friendship,** 6 bis rue Carnot, Versailles (S. & O.), Francujo korespondas Esperante kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj.

**Serĉas seriozajn korespondantojn** el ĉiuj landoj, prefere filatelistojn kiuj povos sendi je bazo internaciaj katalogoj ĉiujn eldonojn 1949/50 ; petas iamajn korespondantojn ree skribi Ernesto Schlesinger, str. Molotov 22, Cluj, Rumanujo.

**Licea profesoro pri geografio** deziras korespondi kun gekolegoj en la tuta mondo. S-ro A. Gioud, 22 Quai Victor Augagneur, Lyon 3, Francujo.

**Junulo interŝanĝas** ilustritajn poŝtkartojn tutmonde. Francis Catany, Saint-Jacques, Grasse (A.M.), Francujo.

**Senpage instruist(in)oj, pacifist(in)oj** ricevos aktualan intereseigan informilon "Lernejo por Civilizeco". Aldonu poŝtrespondkuponon (aŭ 2 UL-p-kuponojn). Cerri LpC, C.P. 89, Varese, Italujo. Afranku filatele.

**S-ino Halina Denefeld,** Kopernika 22, Pruszcz-Gdanski, Pollando deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe ekster Eŭropo.

**Hollywood, Los Angeles, Long Beach** Esperanto-Grupo aranĝas letervesperon en fino de Majo. Adresu : Sekretario, Esperanto-Grupo, 648 S. Concord St., Los Angeles 23, California, Usono.

**Intersteno : Gvidilo :** 3-a eldono, 1-a parto. : havebla ĉe A. Giangreco, Cascinagrossa (Aless.), Italujo. Prezo : ses malsamaj uzitaj pm. gluitaj sur neilustrita pk. kun klara adreso.

Se vi deziras ekkoni la naturon de ISLANDO, la islandan popolon, kaj ĝian literaturon, abonu la kvaronjaran bele ilustritan Esperanto-gazeton

## VOĈO DE ISLANDO

Jara abono kostas nur 5 ŝil.

*Mendu ĉe*  
**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.  
Anglujo



# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO

Marto 1950

N-ro 533 (3)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵon en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo /5 : ½ paĝo 50 ŝil.  
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkuponon por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## LA SPIRITA HAVAJO DE LA ESPERANTISMO

Okaze de varbado de nova adepto, la Esperantista aktivulo devas respondi la demandon pri la nombro de la Esperantistoj ekzistantaj. Tio estas embarasa demando se oni ne estas preparita. La nombro de la aktivaj aŭ militantaj Esperantistoj efektive estas malgranda kompare kun la daŭra penado de miloj da homoj, la ekzisto de riĉa dokumentaro, la regula uzado de la lingvo iganta ĝin vivanta idiomo, la miloj kaj miloj da rilatoj inter diverslandaj personoj pere de Esperanto, la kongresoj, k.s. Ĉia komparo kun alia movado lamas, ĉar internacia lingvo estas io tute aparta, ne komparebla kun alia klopodado. Tamen eble unu komparo estas rajtigata : la kluboj por fremdlingvoj, kiaj ekzistas en ĉiuj landoj por kunvenigi la studentojn de la ĉefaj fremdaj lingvoj (angla, franca, germana, hispana, itala, rusa, k.t.p.). Ili ĝenerale grupigas ne multe pli da anoj ol niaj Esperantistaj grupoj, kaj la lernado de fremda lingvo estas karakteriza signo de nia tempo ! Ĉi tiuj societoj, iafaĵe havigantaj al siaj membroj realajn avantaĝojn, konas la saman fenomenon, kian niaj grupoj : regulan alvenon de novaj kaj same regulan forlason de malnovaj membroj. Ĉi tiu fenomeno pruvas nur, ke la intereso ne estas enradikigita ĉe ĉiuj, kaj ke la lingvo lernata tre ofte perdas sian altirpovon. *Nombroj regas la mondon !* iam diris eminentulo. Jes, per la nombroj ni povas rekonii, ĉu la mondo estas bone aŭ malbone regata ; sed ĝuste ĉi tiu aksiomo ne estas aplikebla ĉe nia movado, dependa de la bonvolulo kaj apostolemo de ĝia anoj.

Se ni ne povas kalkuli je milionoj da aktivaj Esperantistoj (kunigitaj en grupoj kaj tutlandaj societoj) ni tamen posedas **spiritan havaĵon** ne ignoreblan ! Tio estas nia literaturo, impona laŭ nombro de la libroj, impresa laŭ la konsisto, kaj multrilate bonkvalita laŭ presteknika vidpunkto. Nuntempe ne plu estas eble, ke privata Esperantisto posedu la tutan verkaron en Esperanto, regule kompletigante ĝin per la nov-aperajoj. Kie do oni povas vidi per propraj okuloj nian spiritan havaĵon, la Esperantan literaturon ? Kun ĉagreno ni diru, ke ekzistas en Eŭropo **nur tri lokoj**, kie nia spirita havaĵo estas kunigita. Temas pri la Biblioteko de la Brita Esperantista Asocio, prizorgata de samideano Montagu C. Butler, la Biblioteko de U.E.A. en Genevo, kaj la Esperanto-Muzeo en Vieno. La valora biblioteko de la estinta Esperanto-Instituto en Leipzig malaperis, same kiel aliaj bibliotekoj malpli gravaj laŭ nombro de objektoj. Eldonaĵoj de la unua epoko de nia movado, precipe la verdaj kajeroj de presejo Tümmel en Nurnbergo, estas unuarangaj maloftaĵoj. En Ameriko ĝis nun ne ekzistas ia biblioteko tia, kaj estus dezirinde, ke oni pripensu kreon de tio. En venontaj numeroj de *Esperanto* aperos raporto pri la tri nomitaj trezoroj, traktantaj aranĝon, celon, konsiston, por ke novaj samideanoj ekkonu tion, kion ni rajte kaj fiere povas nomi la spiritan havaĵon de nia lingvo kaj de la Esperantismo.

H. J.



# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Unuiĝintaj Nacioj

UN eldonas ĉiumonatan bultenon en franca kaj angla lingvoj. La eldono de la 15-a de decembro lasta enhavis artikolon pri la datreveno de la universala deklaro de la homrajtoj. Apud la artikolo estas reproduktajo de la kovrilpaĝo de ĉi tiu grava dokumento en aro da lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanto.

## Aŭstralio

Inter la 3-a kaj 7-a de januaro okazis en Melbourne la 7-a Tutaŭstralia Esperanto-Kongreso. Partoprenis ĝin 115 samideanoj el la 6 ŝtatoj de tiu kontinento kaj inter ili estis 14 eksterlandanoj reprezentantaj 11 landojn (tiuj estis Aŭstralianoj migrintaj en la landon dum la postmilitaj jaroj. Speciala karakterizaĵo de la kongreso estis Esperanta ekspozicio kun pli ol mil aĵoj el 53 diversaj landoj, kiu nun vojaĝas tra la lando. La kongreso organizis ankaŭ 4 radio-dissendojn pri Esperanto kaj por la unua fojo en la historio de Aŭstralia radio okazis speciala dissendo en Esperanto al Eŭropo kaj Ameriko. Prezidanto de la Kongreso estis D-ro C. J. Caldera el Perth. Unu el la partoprenantoj estis S-ro Kelk, kiu vojaĝis pli ol 3,500 mejlojn el Okcidenta Queensland (Kvinslando) por ĉeesti la kongreson. Grava parto de la kongreso estis la partopreno de multaj instruistoj, kiuj forte klopodas enigi Esperanton en la temaron de la lernejoj. Ilia organizaĵo estas Aŭstralia Instruista Esperanto-Asocio kaj la organo *Klerigo* (ĉiumonate). Por apogi la klopodantojn ĉe la radio, helpus alsendo de gratuloj, kaj petoj pri novaj elsendoj, al la du radio-stacioj (1) Radio Australia, Melbourne, Vict., Aŭstralio, kaj (2) Radio A.B.C., Melbourne, Vict., Aŭstralio. Tamen skribu nur en Esperanto!



D-ro Caldera malfermas la 7-an Aŭstralian Kongreson.

## Brazilo

En marto la grava oficiala radio-stacio *Rádio Ministério da Educação* donas al Esperanto ankoraŭ pli grandan apogon. De tiam ĝi prezentas

ĉiusemajnan programon, kiu montras historiajn faktojn internaciajn. Tiu programo estas disradiata en portugala lingvo, sed la dialogoj kaj kantoj okazas en Esperanto. Tial, la samideano, kiu preparas la materialon, petas ĉiujn, kiuj povos helpi, sendi rakontojn pri naciaj herooj, faktojn pri la kultura vivo ĝenerale, pri modernaj teatro kaj kino, muzikaĵojn (en Esperanto) en disko aŭ por kanto. La programo estas dediĉata al po unu lando. La elspezoj pri sendo estos pagataj. Sendu ĉion al: D-rino Ilka Duque Estrada, Rua Juiz de Fora 52 (Grajaú), Rio de Janeiro, Brazilo.

**Brazila Kongreso:** Okaze de la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto la Ŝtata Statistika Departemento eldonis tre allogan resumon statistikan pri la ŝtato Rio Grande do Sul, kun unupaĝa informilo pri la ŝtata ĉefurbo Porto Alegre. La faldfolio estas eldonita en 5000 ekzempleroj. Al la direktoro de la koncerna departemento D-ro Remy Gorga estu direktataj niaj plej sinceraj gratuloj kaj danko.

## Britujo

### Festo de Britujo 1951

Komisiitoj de la Brita Esperantista Asocio sin turnis al la propagandestroj de la nun preparata Festo de Britujo kun celo prezenti la pretendojn de Esperanto inter la lingvoj uzotaj. Per frapantaj faktoj pri la jama uzo de la Internacia Lingvo, oni sukcesis interesi la koncernajn instancojn. Estus granda helpo, se el ĉiuj partoj de la mondo venus petoj, kompreneble en Esperanto, pri informo pri ĉi tiu grandioza Festo. La adreso, al kiu informpetoj estu direktataj, estas: Festival of Britain 1951, 2 Savoy Court, Strand, LONDON, W.C.2, Anglujo. Grave: **Ne rekomendu uzon de Esperanto** (tion lasu al la komisiitoj) sed simple, en Esperanto, petu informon kaj eventuale Esperantan literaturon, pri la Festo. Dankon.

**Londona varieteo:** Ne estas nova la opinio, ke varieteo povas esti same valora por Esperanto, kiel literaturo. Tial oni kronikas kun plezuro la ege sukcesan laboron de tiuj samaj Londonaj Esperantistoj, kiuj en la Antaŭkongreso en 1949 prezentis la aplaŭditan Verdan Kabaredon en la bela urbdomo de St. Pancras en Londono. Temas pri lastatempaj prezentoj en Londono kaj ĉirkaŭaj urbetoj de varieteaĵo laŭ speco de angla *phantomimo* post Kristnaska ferakonto kun aldonitaj komikaj kantoj kaj dialogoj tuŝantaj aktualajn aferojn de la publika vivo. Efektive multaj el ni sentas kvazaŭ la etoso de Schwartz kaj La *Verda Kato* migris al Londono! Aŭtoro estis S-ro H. W. Holmes, konata kaj populara prezidanto de la Londona Klubo, kaj reĝisoro denove Ken Alexander.

Inte

De

okazo

Pariz

sur la

ĉirkaŭ

d'Anj

sin t

blvd.

Po

polici

Com

Fran

pri la

Po

sami

elsen

unua

Tem

La d

18-4

31.15

Sved

skan

de la

aŭ R

Vene

Ex

kong

pliar

Stut

kong

Kron

Ned

1948

kons

land

E

la a

ekzi

1600

nom

gehe

kom

scier

Finn

eltr

plan

kron

Li in

kaj

Zam



**Francujo**

**Internacia Esperantista renkontiĝo en Angers**

De la 28-a de julio ĝis 4-a de aŭgusto ĉi-jare okazos en Angers, kiel preludo de la 35-a U.K. en Parizo, internacia renkontiĝo. Okazos ekskursoj sur la riveroj Maine kaj Loire kaj en la pitoreska ĉirkaŭaĵo, kun gustumado de la famaj *vins d'Anjou*. Por ricevi informojn kaj detalojn oni sin turnu al la sekretariino: F-ino Nouais, 28 blvd. Descazeaux, Angers (M. et L.) Francujo.

**Policistoj:** Organizado de la Esperantistaj policistoj fokusiĝas ĉe S-ro A Schwartz, Commissaire Principal, Strasbourg, Pont de Kebl, Francujo, al kiu oni direktu ĉiujn informpetojn pri la fako.

**Italujo**

Post multaj klopodoj ĉe radio-instancoj la samideanoj en Italujo fine sukcesis persvadi pri elsendo de parolado en Esperanto. Tiu estis la unua postmilita parolado en la itala radio. Temas pri mallonga traktado pri la Sankto Jaro. La dissendo okazis la 1-an de feb. je 18-30 ĝis 18-40 (greniĉa tempo) per du stacioj je 25.40 kaj 31.15m. respektive. Tio okazis sub rubriko *Sveda programo* kaj estis direktata speciale al la skandinaviaj aŭskultantoj. Por apogi la laborojn de la italaj samideanoj, nepre sendu gratulleterojn aŭ *Radiodiffusioni per l'Estero*, "Esperanto", Via Veneto 56, Roma, Italujo.

**Nederlando**

En nia februara numero ni informis pri la kongreso de L.E.E.N. en Groningen. Ni aŭdonas plian informon, ke oni atendas, ke S-ro Mason Stuttard, komisiite de U.E.A., partoprenos la kongreson en Groningen kaj prelegos tie pri U.E.A. Krom tio, S-ro Stuttard, jam bone konata en Nederlando pro sia prelegvojaĝo en Septembro 1948, intencas fari prelegojn diversajn—interkonsente kun L.E.E.N.—en kelkaj urboj nederlandaj.

**Esperanto en astronomio!**

En la elementaj lernolibroj oni klarigas, ke inter la astro-vojoj de la planedoj Marso kaj Jupitero ekzistas la asteroidoj. Hodiaŭ oni konas preskaŭ 1600 da ili. Ĉi tiuj malgrandaj planedoj bezonas nomojn. Unue oni nomis ilin laŭ mitologiaj geherooj. Elĉerpinte tiujn nomojn, la eltrovintoj komencis nomi ilin laŭ familianoj, amikoj, sciencistoj, sanktuloj, urboj, ŝipoj k.s. En Turku, Finnlando laboras famekonata astronomo, eltrovinto de multaj kometoj kaj malgrandaj planedoj, D-ro Yrjo Väisälä. Tiu sinjoro estas, krom klera sciencisto, ankaŭ fervora Esperantisto. Li informis, ke du novajn asteroidojn n-rojn 1421 kaj 1462 respektive li nomis *Esperanto* kaj *Zamenhof*.

A. Paluzié-Borrell, Bibliotekisto en la Astronomia Societo, Barcelona

**ESPERANTO KAJ RADIO**

*Mallongigoj:* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĉiutage</b>	14.45-15.00	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I. Ĉeĥoslovaka Radio, Esp.-sekcio, Stalinova 12, Praha XII.
	17.15-17.30	Paris. 48.82m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
<b>Lundo</b>	05.30-05.35	Wien. 506m., 31m., 41m. I.
	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	21.45-22.00	Praha 470m., 325m., 259m.
<b>Mardo</b>	01.15-01.30	Sveda Radio. 49.46m., 27.83m.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 13.94m. sur 25.39m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
<b>Merkredo</b>	13.20-13.35	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan merkredon). Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa. Koszydowa 8.
	21.45-22.00	Praha kiel funde.
	22.00-22.45	Praha II. 269m., 325m., 219m. Verda Stacio nur la unuan merkredon. Stalinova 12, Praha XII, ĈSR.
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
<b>Vendredo</b>	08.05-08.20	Paris. 386m. K. (ĉiun duan vendredon).
	14.30-14.45	Graz. 240m. K. Radio Graz, Esperanto-Voĉo, Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
	15.40-15.55	Wien. 228m., 25m., 31m., 41m. I. Ĉiun duan vendredon. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Anonco pri la franca radio:** Por kontentigi la kreskantan intereson pri la dissendoj el Radio Parizo, oni intencas disaŭdigi novan rubrikon ĉiun kvaran mardon de la monato, *La vivo de Esperanto en la mondo*. Oni tial petas, ke ĉiuj organizaĵoj uzantaj Esperanton regule informu la stacion pri (a) Esperanto en la radio, (b) Esperanto en la lernejo, kaj (c) Esperanto ĉe la blinduloj.



# GRAVA ATINGO! U.E.A. PARTOPRENAS EN UNESCO-PROJEKTO

## Homoj kontraŭ la dezerto

Konsidere al tio, ke la monda loĝantaro rapidege kreskas, la fakto, ke triono de la tersurfaco konsistas el dezertoj aŭ sekegaj regionoj, estas tre grava. Tiaj malfekundaj terenoj estas ne nur neproduktaj, sed ili konstante minacas pli-ampleksigi sin. Inter ili kaj la homaro estas daŭra batalo.

Kun la celo fokusi atenton sur la problemojn kaj samtempe fari objektivan esploron pri la diversaj manieroj laŭ kiuj la homoj luktas por sia vivo en tiaj regionoj, Unesco komisiis al S-ro Ritchie Calder (elp. Riĉi Kalder) fama angla sciencjurnalisto, la taskon fari esplorvojaĝon laŭ la marbordaj regionoj de Norda Afriko. De la sidejo de la antikva Kartago li vojaĝas tra Tuniso, Egiptujo, Palestino (Izraelo) kaj ĝis la platlandoj de Persujo, reen tra Palestino (Izraelo) kaj hejmen tra Cipro kaj Grekujo. Jam de la mezo de februaro liaj raportoj aperas en la granda kaj grava ĵurnalo *News Chronicle* dufoje semajne dum ses semajnoj.

Tiu gazetraporta serio, kun titolo *Homoj kontraŭ la dezerto*, estas aranĝita kunlabore kun la Brita Komisiono por Unesco kaj la Ministerio de Edukado. En tre multaj lernejoj tra la lando infanoj sekvas la vojaĝon laŭ la raportoj. Por helpi en tio, granda mura landkarto, proksimume 55×160cm., estas speciale preparita de la fama landkarta firmo George Philips & Son Ltd. Diversaj edukaj kaj aliaj gazetoj en Anglujo traktas la aferon. Post sia reveno S-ro Calder preparos specialan raporton por la Naturscienca Fakto de Unesco.

Ni havas la grandan ĝojon sciigi, ke kunlabore kun la Brita Komisiono por Unesco kaj *News Chronicle* la **Esperantistaro partoprenos ĉi tiun**

**projekton de Unesco** ĉar ni ricevis permeson prezenti en *Esperanto* mallongigon de la serio de artikoloj, kiuj certe interesos legantojn en multaj landoj pro la aktualo de la temo.

Ĉi tio ne estos raporto pri hombuĉa milito, sed pri milito kontraŭ sablo kaj la naturo por la bono de la homaro. **Por la unua fojo en la historio Esperanta gazeto ricevis ekskluzivan rajton partopreni en mondskala oficiala afero, kaj historio jam estas farata per tio, ke U.E.A.—la plej granda Esperantista organizaĵo en la mondo— estas elektita reprezenti la Esperantan mondon en kunlaboro kun Unesco.** Ni krome devas rigardi ĝin granda privilegio kaj honoro ricevi la permeson uzi la raportojn de unu el la plej eminentaj ĵurnalistoj en Britujo.

Jam de la aprila numero de *Esperanto* ni presigos kvar dupaĝajn artikolojn traduke resumitajn de E. D. Durrant—U.E.A.-komisiito por Unesco-aferoj—kaj ni jam nun konigas la informon, ke Esperantistoj ĉie rajtos traduki la artikolojn en sian nacian lingvon kaj represi en Esperantaj gazetoj **kondiĉe ke ili menciu la originalan fonton la ĵurnalon *News Chronicle*, kaj la fakton, ke ili estas prenitaj el nia gazeto *Esperanto*.** Tiel agante, ili montris al Unesco, ke la Esperantistaro estas vivanta popolo kun vigla intereso pri paco kaj rilataj temoj.

U.E.A. povos sendi ekzemplerojn de la landkarto supre aludita, kiu mem estas interesa presaĵo, al ĉiu kiu sendos 4 int. rpk. (Britoj 1/1). Notu tamen, ke la teksto estas en Angla lingvo. Ju pli da aĉetantoj, des pli ni povos impresi la koncernajn instancojn pri la viglo de la Esperantistoj.

## RAPORTO DE UNESCO REKOMENDAS ESPERANTON

Komisiite de Unesco, D-ro Holmstrom verkis detalan raporton kun temo: Interlingvaj Sciencaj kaj Teknikaj Vortaroj. La raporto analizas ne nur la lingvistikan flankon, sed ankaŭ la postulojn de sciencistoj, kiuj devas okupi sin pri tradukado, kaj diversajn problemojn financajn kaj normigajn. Holmstrom emfazas, ke estas necese radikale esplori la terenon por eltrovi la plej trafan manieron provizi taŭgajn fakvortarojn. Li krome atentigas la vortaristan teknikan problemon de stilo kaj aranĝo, precipe pri poliglota terminaroj. Tuŝante diversajn sugestojn pri uzo de naciaj lingvoj, li interalie diras:—

“Alternative la pontlingvo por tiu celo povus esti Esperanto, kiu, estante artefarita, evitigus naciajn ĵaluzojn

kaj krome prezentus aliajn avantaĝojn. La Esperanta gramatiko estas tiel simpla, ke post kiam ĝia vortprovizo estus tiel popularigita, la efektiva tekstoj en ĝi funkcius nur kiel ŝtopaĵoj inter la kodvortoj troveblaj en la vortaroj kaj tuj kompreneblaj. (La nuna skribanto, kiu neniam antaŭe provis legi Esperanton, konstatas, ke li havas nenian malfacilon kompreni la plimulton de *Scienca Revuo*). Se Esperanto estus popularigata inter sciencistoj kaj teknologoj pere de ĉi tiu okaza uzado, ĝi donus multajn praktikajn avantaĝojn aliflake, kiel ekzemple en la dissemado de ĉerpajoj kaj la forigado de interpretado en internaciaj konferencoj.

La raporto kompreneble spegulas la personajn opiniojn de la aŭtoro, sed ne la oficialan sintenon de Unesco. Interesatoj povas senpage ricevi ekzempleron de la raporto de Unesco, 19 Av. Kléber, Parizo 16. Okaze de peto, nepre citu la kodindikon: Unesco/NS/SL/1.



# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe U.E.A.



\***Leteroj el mia muelejo** de Alphonse Daudet; trad. Mijake-Sihej. Eld. Japana Esperanto-Instituto. 15-11cm. 80p. broŝ. prezo 2ŝ. 6p.

Por la unua kajero en sia nova serio *Internacia Biblioteko* J.E.I. faris strangan elekton—mond-faman Francan verkon, tradukitan de Japano! Mi jam kelkfoje komentis pri la malaprobinda kutimo traduki el lingvo nepropra kaj ĉi tiu verko ne malpliigas mian kontraŭstaron al tiu principo. La aŭtoro diras en la *Antaŭparolo* ke li "volis doni specimenojn de fremdaj stiloj al novaj junaj esperantistoj, al kiuj mankas rimedoj havigi al si eksterlandajn eldonaĵojn." Ĉu estas do troa postulo, doni al novaj junaj Esperantistoj la fundamentan stilon de Esperanto? Presita libro estas io daŭra kaj ĝi devus esti modelo. Tial estas diskutinde, ĉu la laŭvorta redono de nacilingvaj frazoj efektive kontribuas al nia literaturo. En naciaj literaturoj la lingvo ofte estas la vesto de la penso, kaj ŝajnas al mi, ke traduki la materialan formon sen interpreto de la spirita enhavo spitas la fundamentajn principojn de la tradukarto. Kiu, sen la *Antaŭparolo* noto, komprenus *oni vidis lin treni sian ŝaketon en ĉiuj stratfluctoj de Avignon?* (oni vidis lin vagadaĉi tra la stratoj de Avignon).

Mi ne vidas profiton aŭ utilon en la kutimo redoni indiĝenajn vortojn per simpla adapto al Esperanto kaj lokado de piednoto por klarigi la sencon. Kial ne simple traduki la sencon? Ekzemploj estas: *mazo* (*mas*=farmdomo); *ĝindro* (*gindre*=knedisto en bakejo); *vailo* (*vaille*=ĉefservisto); *miaro* (*miarro*=juna farmservisto) k.s. La teksto sur p. 40 *kabro de senoro Seguin, keu batales la totan notton kon la lupo, kae poste la matenon la lupo ĝen manĝes*—provo redoni la atmosferon de la dialekto—estas simpla monstraĵo. La diversaj provoj traduki variaĵojn de nacia lingvo ĝis nun tute ne estas kontentigaj. Kripligo de Esperanto ne estas la solvo pro la baza fakto, ke Esperanto ne jam estas familia lingvo kun ties delikataj nuancoj de esprimo, kaj la sekvo de kripligo estas evidente artefarita ĵargono—*pidĝino*—kiu elvokas nur malbelan, ĝenan kaj neniel taŭgan impreson.

Per ĉi tiu mia komentario mi povus doni la impreson, ke la verko havas malmultajn meritojn. Tion mi ne intencas. La traduko grandparte estas facilflua kaj leginda. La tradukinto tamen malkaŝe eksperimentas, kaj precipe ĉar li estas ne-eŭropano necesas konigi al li la reagojn de okcidentaj literaturamantoj. Mi esperas, ke li bonvenigos la komentojn, faritajn cetere neĉikane. La originalo jam de jaroj estas amata verko mia

kaj kvankam mi trovis en ĉi tiu traduko multon ĝuindan kaj ĝueblan, ĝi verdire donis al mi nur etan parton de la ĝojo, kiun mi ricevis el la franclingva originalo. Mi estas certa, ke la tutan folkloran kvaliton en la stilo de Daudet—aparte Daudet, el ĉiuj francaj verkistoj—oni povus plej bone rekapti per la simpla fundamenta stilo de la Majstro.

Mason Stuttard.

Noto: Nur post verkado de la ĉi-supra recenzo trafis en miajn manojn *Kompreni* (Nov.-Dec. 1948) enhavanta *La kaprino de S-ro Seguin*, unu el la rakontoj de Daudet en la recenzita libro, en traduko de franco G. Dumoulin. Malgraŭ kelkaj gramatikaj eraroj, ĉi tiu ĉiel superas la tradukon de la japana samideano, kaj emfazas, se emfazo estas necesa, la dezirindon traduki nur el la gepatra, aŭ propra, lingvo.

M.S.

**Korekto:** Sur p. 9 (jan. 1950) troviĝas, ke *Rabeno de Baharaĥ* estis de Salom Alejhem. Tiu verko estis de Heine, sed troviĝas en la sama volumo kun *La Gimnazio*. Kulpas la redakcio kaj ni esprimas nian bedaŭron al S-ro J. S. Dinwoodie en kies recenzo aperis la eraro.

**Ni dankas:** La traduko *Observadoj de D-ro Ĉu* de Johano Papini (al kiu ni esprimis nian dankon en la januara n-ro), estis farata ankaŭ kun permeso de la grava Itala ĵurnalo, *Il Corriere della Sera* en Milano, al kiu ni direktas nian sinceran dankon.

**La Langue Universelle Esperanto** de F. Baronnet. Eld. Esp. Centra Librejo, Parizo. 210 × 135mm. 192p. broŝ.

Unuaparte ĉi tiu franclingva lernolibro konsistas el 22 lecionoj. Prave la aŭtoro kunigis la plej gravajn elementojn de la Esperanta gramatiko en la unuaj 15 lecionoj. Bonaj tekstoj de diversaj verkistoj duaparte kondukas kuraĝan lernanton per helpo de klaraj rimarkoj al tre kompleta kono de la lingvo Esperanto. Kunaj gramofondiskoj estas poste eldonotaj.

A. Labit.

**Broŝuroj k.t.p. ricevitaj:**

**Esperantista poŝkalendaro 1950.** El. Esp.-klubo en Hradec Kralove, ĈSR. Enhavas multajn gravajn informojn pri la movado.

**La konsumkoopero kaj ekonomia vivo de Svedujo** de Thorsten Odhe. Eld. Sveda Esp.-Fed. Koopera Sekcio. Interesa kaj bele produktita 17-paĝa broŝuro kiu resumas la historian evoluon de la sveda konsumkoopero. Ilustrita. Senpage ricevebla ĉe: Kooperativa Federacio, Stockholm 15, Svedlando.

**Preĝo al S-ta Francisko** de blinda poeto N. Salvaneschi; trad. F. Ruggiero. Tri ekzempleroj riceveblaj kontraŭ 1 rpk. ĉe la tradukinto, Casella postale 327 A.D. Roma, Italujo.

**Budai Nagy Antal** ilustrita pk. kun Esperanta teksto. Eld. Esp. Kultur-Servo, prezo 1 rpk., ĉe Jolsva u.4, Budapeŝt, Hungarujo.


**Brugge** ilustrita faldfolio pri la *artjuvelo de Belgujo*. Senpage ricevebla ĉe: Urba Servo por Turismo, Diiver 16, Brugge, Belgujo.



## ESPERANTISTA VIVO

## Paul Blaise

Je la 12-a de Januaro mortis en Liverpool, atinginte 69 jarojn je la 22-a de decembro 1949, **Paul Blaise**, konata inter la Esperantistoj de la malnova gvardio sub la pseŭdonimo *Po Bo*. Naskiĝinte en Louvain, Belgujo, Blaise venis frue en Anglujon kaj akiris britan ŝtatanecan. Esperantisto de 1903, li partoprenis ĉiujn fazojn de la historio de nia movado, profesie laboris en la estinta ĉekbanko Esperantista en Londono, agis ĉie, kie oni bezonis kunlaboranton seriozan kaj persistan. Li edziĝis kun la tre bone konata angla propagandistino Margaret Jones, la *Esperantista anĝelo*, verkintino de multe uzata lernolibro.



Grandan rolon ludis Blaise en U.E.A. al kiu li apartenis kiel kunfondinta membro de la unua komitato kaj seninterrompe partoprenis ĝin ĝis 1934. Personaj komplikaĵoj, la morto de lia amata edzino kaj malsano igis lin demeti sinsekre ĉiujn funkciojn en la movado. Per li malaperis la lasta komitatano de U.E.A. el la fonda jaro 1908. Ni kiuj konis Blaise de jardekoj ĉiam memoras la nigreharan malgrandan viron, vigle diskutantan kaj argumentantan kun granda sarkasmo kaj sprito. La memoro al li kaj al multaj agrablaj horoj pasigitaj kune dum kongresoj kaj en komitat-kunvenoj restos inter ni.

*Hans Jakob, Redaktoro.*

**La 45-a Ĉiujara Kongreso de la Skota Federacio** okazos 19-22 majon, 1950 en Troon, Skotlando. Kongresa sekretario, al kiu oni sin turnu por ricevi ĉiujn informojn, estas S-ino K. Rossetti, Sevenoaks, Willockston Road, TROON, Skotlando.

## Earnest Archdeacon 1863-1950

La 3-an de Januaro mortis en Versailles grandanima homo, kiu per multaspekta klopodado energie helpis al pluraj progresigoj de la homaro. **Earnest Archdeacon**, Honora Membro de U.E.A., Honora Prezidanto de la Franca Esperanto-asocio, Lingva Komitatano, naskiĝis 28 marton 1863 en Parizo. Post rapida trarigardo al la juro, kiel advokato, li tuj interesiĝis pri la interkomunikigaj sportoj kaj fariĝis apostolo de la sfera balono, aŭtomobilo kaj aviadilo. Kun Serpollet li estis la unua, kiu sukcesis en 11 tagoj atingi Lyon el Parizo per aŭtomobilo. En 1904 kun Deutsche de la Meurthe li malavare proponis premion de 50.000 fr. por la unua kilometra rondflugo per flugilo. Gajnis la premion Henry Farman en 1908. Samjare Archdeacon fariĝis Esperantisto kaj komencis verki propagandajn artikolojn en sennombraj gazetoj. Kelkajn jarojn poste li verkis *Kial mi fariĝis Esperantisto?* Danke al ĝi Archdeacon varbis al nia ideo multajn klerajn homojn. Prezidanto de la Pariza Grupo, li fariĝis en 1926 ankaŭ prezidanto de S.F.P.E. Tiun oficon li okupis ĝis 1945. Kun J. Guillaume kaj la subskribinto li estis respondeca pri la kaŝa propagando de S.F.P.E. malpermesata de la Germanoj en okupado (1940-44). Ĝis la lasta horo li daŭre interesiĝis pri aviado kaj Esperanto. La Komitato de U.E.A. honoris lin kiel Honoran Membron dum la kongreso en Bournemouth.

Malmultaj estas la homoj, kiuj tiel longe kaj entuziasme sin oferis al la Esperanta ideo. Archdeacon estis unu el tiuj pioniroj. Kun Bastien, Warnier, Guillaume, Couteaux kaj aliaj ni salutis lastfoje nian karan prezidanton.

*P. Petit, Estrarano de U.E.A.*

## Morto

**Helminen** J. E. en Vaasa, Finnlando, 17-an de jan. 60-jara, fondinto kaj prezidanto de la loka grupo. Multajn jarojn D. de U.E.A.

Al la parencoj ni esprimas nian sinceran kondolencon.

## Naskiĝoj

**Misiewicz** al S-ro W., Del. en Radom, 15 dec. 1949 filino **Esperantino Izabel**.

**Régulo Pérez** al Ges-oj J. en La Laguna, Kanariaj Insuloj, 6-an de januaro, dua filino **Ana**. Sincerajn gratulojn.

**Touring Club Italiano** (Itala Turisma Klubo) per faldfolio sciigas, ke ĝi uzas Esperanton inter la oficialaj lingvoj kaj volas varbi vian intereson pri la belaj de Italujo, pri ĝiaj historio, artaj trezoroj kaj popola vivo.

Kun la prospekto estas aliĝilo kun multaj informoj. Ĉio en Esperanto. Interesatoj sin turnu al: Touring Club Italiano, Corso Italia 10, MILANO, Italujo.

EN  
Solve  
Molière  
Gajn  
F-ino J  
(Ned.)  
Solve  
N-ro  
kiosko  
embrio  
N-ro  
erupti,  
kazin,  
N-ro  
(626).  
Bona f  
De zor  
kaprino  
Enig  
substre  
strofon  
S-ino C

N  
K  
N

Enig  
litergr  
en la d  
abn, a  
ape, a  
dok, e  
igr, iig  
juo, k  
mot, r  
omo, c  
ron, r  
tor, tr  
La  
fluidaj  
malsin  
regim  
kuraci  
malhel  
19. b  
22. la  
25. gr  
28. av  
vortoj  
34. ilo



### ENIGMA KONKURSO N-ro 46

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 42-a konkurso : F-ino J. J. v. Thiel (Ned.) 109p., S-ro D. A. W. Henskes (Ned.) 108p., S-ro Chr. F. W. Slijper (Ned.) 107p.

#### Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 44.

**N-ro 93 :** maniko, krispa, skismo, aprilo, krampo, kiosko, atlaso, ursino, sprono, kiraso, akriĝi, averti, embrio, nepras, agonio, sponga, trompa, argilo, opinio.

**N-ro 94 :** oktavo, tavolo, epopeo, porcio, kriptio, atletio, erupti, ironio, asocio, parizo, ornami, erneno, viskio, kazino, inviti, vintra, alibio, anteno, elizii.

**N-ro 95 :** Al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas (626). Al malsaĝulo ne helpas admono, nur bastono (805). Bona famo sin trenas testude, malbona kuras rapide (709). De zorgoj, ne de jaroj, blankiĝas la haroj (492). Eĉ kaprino plaĉas, se la doto sufiĉas (654).

**Enigmo N-ro 98. Ĉevalira enigmo.** Komencante per la substrekita silabo, oni povas legi el la ĉi-kuna figuro strofon el konata poemo de D-ro Zamenhof. Ensendis S-ino C.M.E. den Hollander-Mighorst (Ned.).

NOS	LA	NI	DAŬ	VEN	FE
KUN	BAL	<u>GLO</u>	RO	PON	ĜI
RA	BE	CE	KO	L'A	LA
LA	FI	DO	KA	VE	VOS
NIN	LO	RO	LE	ĜO	TA
E	MON	JE	SANK	LA	NOS

**Enigmo N-ro 99. Litergrupa enigmo.** El la ĉi-subaj 105 litergrupoj formu 35 naŭliterajn vortojn. kies duaj literoj en la donita sinsekvo formas proverbon.

abn, aer, afi, ajo, aku, akv, ali, alo, amo, ano, ant, ant, ape, ape, are, ast, bat, bra, bro, cel, cer, cio, ĉin, det, dok, ebr, ega, elo, eri, erm, erv, eto, fot, gio, gli, gut, igr, iig, iki, ikn, ini, ink, ino, ino, int, ipa, iva, ivo, ivo, juo, kco, kia, kla, kon, luz, mat, met, mik, mil, moa, mot, nea, nis, nta, nto, nto, obs, ofo, ogr, olo, olo, ome, ome, ona, ono, ono, opl, ori, ple, psi, pul, rit, rko, rof, ron, rop, rto, sep, sif, smo, spo, sto, sto, str, tem, tio, tor, tra, tro, tro, tro, tru, ume, ume, zat.

La signifo de la vortoj estas : 1. trinkaĵo ; 2. grasa fluidaĵo ; 3. eta pezilo ; 4. sindonemo ; 5. soforo ; 6. malsimpatio ; 7. krudaĵoj ; 8. meminciata ; 9. parto de regimento ; 10. pridemandado ; 11. malsameco ; 12. kuracisto ; 13. ĉefurbo ; 14. krestomatio ; 15. intenca malhelpado ; 16. rezina gumo ; 17. veneno ; 18. monato ; 19. brakringo ; 20. grava skribaĵo ; 21. dorsosako ; 22. laŭcele aranĝi ; 23. grava kazo ; 24. komika aktoro ; 25. gravuraĵo ; 26. fari bildojn ; 27. certa scienculo ; 28. aviadilo ; 29. enhavanta en si ; 30. uzo de superfluaĵ vortoj ; 31. plilauĝigilo ; 32. alkoholo ; 33. precize fiksi ; 34. ilo por mezuri fluaĵdensecon ; 35. memoriga konstruaĵo.

**Enigmo N-ro 100.** La tuto konsistas el 74 literoj, kaj enhavas novan problemon, kiu rilatas al la numero de tiu ĉi enigmo. Ties solvo ne estas necesa por akiri la poentojn, sed tiuj, kiuj serĉos ĝin, rajtas uzi ĉiajn rimedojn.

- 17-52-45-4-37-48-33-60 : kapabla distingi la veron.
- 70-5-42-54-27-22-73 : diligenta agemo.
- 66-25-51-56-29 : batalejo.
- 53-2-23-39-69-41-55 : ekzameni la kvalitojn de verko.
- 14-72-23-50-29 : manĝebla intesto de bestoj.
- 12-5-35-59-63-43 : konfirmi.
- 20-7-52-16-11-74 : largaj strekoj.
- 17-9-36-71-27-67 : kristnaskarboj.
- 46-13-30-34-28-73-61 : bluaĵ kampfloroj (fam. Kompozitoj).
- 1-42-3-24-69-6-11 : pangreno.
- 32-21-62-15-18-37-4-27 : liveras la plej bonan kaviaron.
- 10-57-68-31-49-29 : malgranda ĝlata supraĵo de brilianto.
- 44-22-45-40-33-73 : parto de la korpo de kolo ĝis ventro.
- 8-47-60-58-64 : efektive ekzistanta.
- 19-63-38-11 : malnova mezurunuo de longo.

### Internacia Konkurso 1950

Kiel oni vidas per la ĉi-suba tabelo, kompilita je la 31-a de Januaro, kelkaj landoj jam faris bonegan komencon, kvankam estas tro frue konstati, kiu lando plej bone faros en la fino. Ĉiu faru sian eblon kaj sendube 1950 estos rekorda jaro, montrante ke Esperanto marŝas al la celo—kun forta centra organizaĵo, kiu kapablas entrepreni novajn projektojn, sen la ĉiama baraktado por ekzisti.

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Urugvajo ..	250	240	96.0
2. Izraelo ..	250	220	88.0
3. Hispanujo ..	600	525	87.5
4. Svislando ..	1300	960	73.8
5. Britujo ..	12500	7919	63.3
6. Svedlando ..	4900	3095	63.1
7. Kanado ..	250	135	54.0
8. Germanujo ..	2000	1070	53.5
9. Nederlando ..	5100	2515	49.3
10. Finnlando ..	1800	860	47.7
11. Novzelando ..	850	355	41.8
12. Belgujo ..	2000	820	41.0
13. Irlando ..	250	100	40.0
14. Usono ..	3100	1200	38.7
15. Hungarujo ..	1400	530	37.8
16. Italujo ..	1450	545	37.6
17. Aŭstralio ..	900	335	37.2
18. Francujo ..	5200	1919	36.9
19. Islando ..	660	210	31.8
20. Argentino ..	1000	310	31.0
21. Brazilo ..	2200	635	28.8
22. Danlando ..	3100	830	26.8
23. Sudafriko ..	250	65	26.0
24. Pollando ..	4650	1040	22.4
25. Aŭstrujo ..	700	90	12.9
26. Norvegujo ..	1500	135	9.0
27. Ĉeĥoslovakujo	4200	290	6.9
28. Egiptujo ..	250	10	4.0
29. Jugoslavujo	3600	75	2.1
30. Bulgarujo ..	1300	20	1.5



## ĈU U.E.A. NACIIGIS?

Ni ne volonte polemikas. Tamen iafoje necesas respondi al erarigaj asertoj, eĉ falsaj. La oficiala organo de S.A.T. *Sennaciulo* en numero 536, januaro 1950 aperigis artikolon de R. Laval sub titolo *Ĉu S.A.T. neŭtraliĝis?* Analiza priskribo de la deveno, strukturo kaj tendencoj de la du ĉefaj organizaĵoj de la Esperanto-movado faciligas komprenon pri la temo. Se pri tiu analizo laŭ faktoj nenio estus kritikinda, oni povus trankvile lasi al la legantoj eltiri kiajn ajn subjektivajn konkludojn. Estas tamen konstateble, ke pluraj asertoj tuŝantaj nian Asocion estas ne nur erarigaj, sed pruveble malveraj.

Supozeble por pravigi la kreon de S.A.T., R. Laval asertas: "*Komence, kun Hodler ankaŭ ĝi (t.e. U.E.A.) havis sennaciecan strukturon. Ĝiaj membroj individuaj, senpere aliĝantaj, ĝenerale apartenis ankaŭ al naciaj societoj, apud kiuj ĝi staris tute aparte, same kiel ni havas niajn L.E.A.-ojn.*"

Krome: "*Tiu strukturo respondis al mondkoncepto, kiun difinis Zamenhof en sia parolado ĉe la malfermo de la unua universala kongreso (1905 . . . 'hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo sur Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj'). Tiun koncepton longe kontraŭbatalis la naciemaj neŭtraliĝoj; tiuj deziras, ke U.E.A. fariĝu federacio de naciaj societoj—Universala Esperanto-Asociaro. Komence malvenkintaj, la federaciaĵoj skisme fondis kontraŭ U.E.A. sian federacion Internacia Esperanto-Ligo. Fine venkis la I.E.L.-tendenco; la kunfando de ambaŭ societoj ja fariĝis sub la prestiĝa monogramo U.E.A., sed tio estis kvazaŭ pompa saluto al mortinta dio; restas la titolo pie konservita, sed malplenigita je sia interna signifo. Nome la Asocio restas universala, fakte ĝi fariĝis internacieca; malaperis la sennacieca strukturo kaj la responda spirito. La malsameco de l'konceptoj elmontriĝas per ŝajne etaj, efektive signifaj detaloj. Ĝis 1928 la jarlibro de U.E.A. prezentis la lokojn laŭalfabete en unu sola serio por la tuta mondo: de tiam ĝi vicigas ilin laŭ la regnoj. Ĝi, spite la Akademion, skribadis la landnomojn per -io, eĉ la vorto Esperantio estis unufoje enkondukita de U.E.A. Nun ĝi revenis al -ujo. La proprajn nomojn kutime esperantigis Zamenhof kaj la unuaj aŭtoroj: laŭ la nuntempaj eminentuloj necesas forlasi tiun arkaikan kutimon kaj konservi la proprajn nomojn en ilia nacia pureco.*"

La artikolo volas pruvi ion, kio ne bezonas pruvon. Evidente la verkinto ne observis, ke la tempo ŝanĝiĝis, ke ja okazis tiom gravaj perturboj sociaj, politikaj, mondperceptaj k.a. ke vole-nevole ankaŭ supernaciaj, sennaciecaj organizaĵoj

estis tuŝitaj. **Ĉio fluas**; nenio restas daŭre la sama, eĉ ne S.A.T. ! Ni ne intencas respondi per teoriaj konsideroj, sed nur per faktoj.

**U.E.A. neniam estis sennacieca.** Ĝi estis kaj estas universala. Familio, gento, nacio, estas kolektivoj dependaj de faktoroj ne forigeblaj per kreo de etiketoj. Surglucado de etiketo BONBONO sur pecon de sapo neniel aliigas la karakteron aŭ kvalitojn aŭ konsiston de la sapo. Laŭ strukturo U.E.A. estas esence la sama kiel S.A.T. Ĝi konsistas el **individuaj membroj** senpere aliĝintaj al la internacia organizaĵo (kiel ĉe S.A.T.) kaj tiel konservas sian originalan kaj tradician formon universalan. U.E.A. havas siajn Landajn Asociojn al kiuj ĝi delegas la propagandan laboron sur difinita tereno. Ankaŭ S.A.T. havas tiun sistemon. La grava diferenco estas, ke la membroj de la Landaj Asocioj estas **Asociaj Membroj** de U.E.A. kaj tiamaniere oni garantias al ĉiuj unuoj en la Asocio absolute modelan demokratian reprezentadon.

La Landaj Asocioj de U.E.A. delegas en ĝian Komitaton reprezentantojn konforme al la nombro de membroj en la Landa Asocio. Tion faras ankaŭ la L.E.A. de S.A.T. U.E.A. tamen estas eĉ pli demokrata; ĝi elektas el la Komitato la Estraron, dum laŭ Statuto de S.A.T. la anoj de la Plenum-Komitato devas loĝi en la sama urbo. Malgraŭ la oportuneco de tia aranĝo, tio jam tuj trudus kondiĉon al la demokratio.

La ĉefa diferenco inter U.E.A. kaj S.A.T. estas tio, ke U.E.A., laŭ difino de ĝia Statuto, ne okupiĝas pri io alia ol la ĝeneraligo de la uzado de Esperanto kaj per tio celas al pli bona kompreno inter la homoj de diversaj nacioj aŭ lingvo-grupoj. S.A.T. kontraŭe, akcelas la sennaciecan strukturon de la homaro, t.e. forigon de formo de kolektivo, pri kio ĉiu persono rajtas havi sian propran opinionon.

**Kunfandiĝo de U.E.A. kaj I.E.L.** Ni bedaŭras konstati, ke R. Laval ne studis dokumentojn, kaj ŝajne eĉ ne legis gazetojn. Alie li ne estus povinta skribi tiujn liniojn pri U.E.A./I.E.L. La problemo de kreo de stabila organiza kaj financa bazo por la kompetenta administrado de la Asocio okupis la Esperantistojn dum jardekoj. Ne naciemo, sed rekono de krudaj faktoj diktis tion. La aserto, ke la naciema tendenco venkis per I.E.L. estas opinio subjektiva de R. Laval, ne pruvebla per konkretaj faktoj. Per serioj de intertraktoj, konkretiĝantaj en la Kontrakto de Helsinki (komence) kaj kulmine en la Interkonsento de Kolonjo **en 1933** (!) la mondorganizaĵo solvis siajn problemojn de organiza formo. Kiam okazis la skismo de 1936 tiu havis nenian rilaton kun la formo de organizo.

I.E.L.  
U.E.A.  
tender  
aljuĝi  
bonego  
kaj sa  
organ  
odoras  
politik  
tion n  
viaj m  
Ni t  
ke iaf  
konsu  
Rek  
efektiv  
mem d  
Preciz  
Jam e  
organ  
kiu li  
indivi  
de la t  
de U.E  
la for  
konkre  
Gro  
la loka  
de la l  
decidi  
Genev  
kontr  
laŭlan  
eraroj  
admir  
aliigis  
la ide  
alude  
nomo  
artiki  
Gete,  
mi p  
rekor  
nacia  
perso  
se la  
Voka  
Espe  
lingv  
N  
ni d  
Esp  
eran  
pov  
Ni p  
regi  
jarli  
esta  
pru



I.E.L. simple alprenis la formon jam starigitan de U.E.A. en 1933. Do neniel temas pri venko de tendenco. Nur homo blindigita de partio povus aljuĝi al strukturo pure administra (kaj cetere bonege funkcia) ian koloron politike ideologian, kaj samtempe defendi la saman sistemon en sia organizo kaj fari apologion por ĝi. Tio iom tro odoras de la sofismaj argumentoj de la nuntempaj politikistoj, kiuj uzas la principon: se ni faras tion niaj motivoj estas bonaj; se vi faras tion, viaj motivoj estas malbonaj.

Ni tamen ne malatentas la konatan principon, ke iafoje tiaspecaj sofismoj estas nur por "enlanda konsumo".

**Rekta aliĝo kaj jarlibro.** U.E.A. dekomence efektive konis nur la senperan aliĝon. Kial do ni mem devis krei **jam en 1920 (!)** naciajn centrojn? Precize pro la ŝanĝiĝo en la kondiĉoj ĉiuspecaj. Jam en 1910 H. Hodler prezentis tezon *Kiel nin organizi?* detalan studon pri tiu problemo per kiu li montris la eblojn kunigi la du principojn de individua kaj senpera membreco kaj la enkorpiĝo de la tielnomitaj *Naciaj Societoj*. La kunfandiĝo de U.E.A. kaj I.E.L. estas nenio alia (kiel ankaŭ la formo de la *Interkonsento de Kolonjo*) ol la konkretigo de la deziresprimo de Hodler.

Groteska estas la cito pri la jarlibro. Ĝis 1928 la lokoj efektive alfabetis sin sekvis, kun nur listo de la lokoj laŭlande. Pro praktikaj konsideroj ni decidis aranĝi laŭlande. La administrado en Genevo (membrokontrolo laŭnumera kun ĉefa kontrolslipo konstanta; membrolistoj laŭloke kaj laŭlande, ĉiujare ŝanĝataj) kiu laŭvide devus eviti erarojn, montriĝis en la praktiko tro malelasta de administra vidpunkto, kaj **la subskribinto mem aliĝis ĉion kaj aranĝis ĉion laŭlande!** Tio pri la ideologia tendenco! Alia groteskaĵo estas la aludo pri la nomoj. Jes, ni preferas uzi la nomojn de personoj nacilingve. Se necese, en artikolo ekzemple, ni ne vidas malutilon skribi *Gete, Sekspir, Volter* (akcento sur la lasta silabo, mi petas!), *Ĉerĉil, Rozevelt* kaj *de Gol*, sed ni ne rekomendas ĝin. Tio neniel rilatiĝas kun niaj naciaj aŭ politikaj konvinkoj, sed estas afero de persona gusto. Loknomojn oni povas transskribi se la nacia formo tion toleras kaj permesas. Voknomojn oni povas transskribi, kondiĉe ke la Esperanta formo konformu al la strukturo de la lingvo.

Ni ne volas longe trakti ĉi tiun aferon ĉar, kiel ni diris en la komenco: ni ne volonte polemikas. Esploro de la afero sur fakta bazo montras kiom eraraj estas la premisoj de R. Laval. Legantoj povas fari siajn proprajn konkludojn pri la resto. Ni precipe tuŝas ĉi tiun aferon pro tio, ke per niaj registroj ni povas konstati (kun komparo kun la jarlibro de S.A.T.) kiom multe da Esperantistoj estas membroj de ambaŭ asocioj, kaj ŝajnas al ni prudente prezenti la veron al tiuj membroj. Rilate

al la kampanjo kontraŭ la neŭtrala movado, kiun iniciatis la gvidantoj de S.A.T. (se oni juĝas laŭ la eroj en la du lastaj numeroj de ties oficiala gazeto), estas menciinde, ke nek en la lastaj kongresoj de S.A.T. nek per referendumo de la membroj tiu starpunkto estas validigita. La Plenum-Komitato neniel ricevis mandaton, komenci tiajn atakojn kontraŭ alia Esperanto-organizaĵo, kun kiu—sur alia tereno—**ĝi kunlaboras.**

Ni povas nur esprimi nian bedaŭron, ke la energioj de Esperantistoj estas tiel disperdataj je senutilaj ĉikanadoj, kiuj povas alporti nur malutilon al nia komuna afero. En la Centran Oficejon de U.E.A. venis pluraj protestoj kontraŭ la starpunktoj de la S.A.T.-organo.

*Hans Jakob.*

**Noto pri la 35-a U.K.**

Danke al la interveno de sveda samideano, S-ro Lennart Aberg, sveda horistaro inklinas, je propra kosto, fari prezentadon dum la U.K. en Parizo kondiĉe, ke el aliaj landoj ankaŭ venu kantgrupoj por fari similan prezentadon. Simile farus svedaj popoldancistoj. En la okazo, se aliaj faros tion, oni bonvolu komunikiĝi kun la L.K.K. en Parizo.

**GAJA LEGANTO PER ESPERANTO**

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj - Vortludoj  
Preseraroj - Anekdotoj  
Matematikajoj - Rimajoj  
Societludoj - Demandaro  
Konsiloj por Grupestroj  
kaj Kursgvidantoj.

1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1p., aŭ 5 int. rpk. afrankite

*Eldonita de*  
**ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.**  
Mendu ĉe U.E.A.

**ELEKTITAJ RAKONTOJ**

Elin Pelin

Traduko kaj klarigaj notoj de  
Simeon Hesapĉiev

Prezo: 2 ŝil., afranko 2p. aŭ 8 int. rpk.

*Eldonita de*  
**Bulgara Esperantista Kooperativo**  
*Mendu ĉe*  
**Universala Esperanto-Asocio,**  
**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**



R. St. Barbe Baker :

## ŜIRMAJ ZONOJ POR LA NOVA TERO

Du farmistoj de la Mez-Okcidento de Usono estis ŝirmantaj sin en kabano dum polvo-ŝtormo, kiam aparte granda nigra polvo-nubo malheligis la sunon. Diris unu: "Mi konjektas, ke tiu estas la bieno de Oĉjo Vilĉo." Efektive, en malpli ol duonhoro Oĉjo Vilĉo alvenis tre ekscitita kaj ekdiris: "Hola, uloj, ĉu vi vidis preterpasi mian farmbienon? Ĝi ĵus forblovigis!"

Tiu anekdoto eble estas ioma troigo de tio, kio fakte ĉiutage okazas tie, kie la homo estas foriginta la protektan ŝirmaĵon de la tero kaj domaĝis planti tie, kie li rikoltis. La historio de arbfaligado en Usono havas la trajtojn de drinkorgio. Oni senindulge nudigis la teron kaj postlasis ruinigitajn komunumojn. Unuaj la blankaj pinoj de New England (Nova Anglujo) cedis antaŭ la hakilo. Kiam la segligno estis forkonsumita la grandaj maŝinaroj transiris al Pennsylvania (Pensilvanio) origine unu el la plej grandaj arbarterenoj. Poste oni atakis la virgajn arbarojn de la *lagŝtatoj* Michigan, Wisconsin kaj Minnesota, kie la arbaristoj trovis vastajn kaj densajn terenojn de blanka pino tute oportunajn apud la akvo por transporto. Vere, jen estis bela okazo por ekspluatado, antaŭe nekonita en la historio! Milojn da arbarlaborantoj oni varbis kaj fungurboj kreskis dumnokte! Grandegajn riĉaĵojn oni rikoltis per la detruo de la arboj kreskintaj dum jardekoj.

Tia estas la bildo, kiu persistas eĉ ĝis hodiaŭ, kiam nur okono de la virga arbaro restas. Tio tamen prezentas nur unu flankon de la afero. La bonaj, profundaj, riĉaj kaj virgaj stepoj, konstruitaj de la naturo dum jarmiloj, kaj povantaj subteni per prudenta mastrumado vastan loĝantaron de kamparanaj familioj, estis plugataj por greno per profunden tranĉantaj plugiloj pelataj de internbrulaj motoroj. Kiam la grundo montris signojn de elĉerpiĝo oni malavare aldonis kemiajn sterkojn kaj tiel rapidigis la diserigon de la grundo, kiu fariĝis viktimo de vento kaj pluvo. La farmbieno de Oĉjo Vilĉo estis nur unu el miloj, kies supra grundo estas daŭre forblovata. Dezertaj kondiĉoj pliampleksiĝas ĉiujare, antaŭenirante laŭ milmejla fronto po 30 mejloj en ĉiu jaro laŭ meza kalkulo. Grundkonservistoj kalkulis, ke en malpli ol jarcento Usono kapablos subteni nur kelkajn milionojn da homoj sur la apudmaraj terenoj. La resto estos dezerto.

Laŭ iniciato de Franklin D. Roosevelt oni komencis ofensivon kontraŭ tiu malamiko de la homo kaj plantis en jaro 400,000 arbojn el miksa

konsisto kaj reduktis arbarbrulojn je 75%. La plano de la Tennessee-vala Aŭtoritato per grand-skala konstruo de natur-drenaj terenoj estas unuaranga eksperimento en la batalo kontraŭ la dezerto. Tiaj planoj tamen estas dependaj de politikaj cirkonstancoj kaj sekve sporadaj.

Kvankam preskaŭ ĉiuj havas ian informon pri la detruaj efikoj de la polvoŝtormoj en Usono, malmultaj konas la amplekson aŭ rapidon de erozio en Aŭstralio. La grenterenoj de New South Wales (Nova Suda Kimrujo) estas la plej multe difektitaj lokoj. La kaŭzo de tio estas, ke greno estas kultivata sur vastaj ondecapaj stepoj, de kiuj oni devus ne esti foriginta la arbojn. La Aŭstralio pioniro elpensis genian sed drastan rimedon por rapidege forigi arbarojn. La hakistoj hakis la arbojn tiel, ke ĉiu falos kontraŭ najbaron, kaj per faligo de unu ĉefa arbo supre de deklivo, la grandega premo faligis ĉiujn samtempe. Dum la seka sezono oni ekbruligis ĝin kaj la brulo disvastiĝis je rapido de ekspresvagonaro. Aŭstralio nun suferas pro la malprudento de la fruaj enloĝantoj kaj vastaj dezertaj terenoj preskaŭ nevenkeblaj ekzistas.

Aŭstralio, kaj efektive ĉiu alia kontinento, staras en dilemo. Unuflanke ekzistas ĉiam kreskanta postulo pri ankoraŭ pli da nutraĵoj por la homaro, aliflanke la evidenta malkresko en la surfac-areo kapabla produkti tiun nutraĵon. Por sukcese eĉ aliri al la problemo, por ne paroli pri solvo, estas pli kaj pli evidente, ke la homaro entute devas radikale ŝanĝi siajn opiniojn pri iuj aspektoj de la procedoj de produktado kaj distribuado.

Ankaŭ Sud-Afriko havas siajn problemojn. Ĉi tiu kompare nova lando frontas la fakton, ke se la nun pereigaj sistemoj de kultivado estos daŭrigataj, tiu lando en la baldaŭa estonteco devos elspezi grandajn energiojn kaj egale grandajn monsumojn por reakiri la terenojn rabitajn de la dezerto. Laŭ opinio de tiu veterano Ĉef-Marŝalo Smuts, se la nuna sistemo persistos, en tre mallonga tempo la loĝantaro de Sud-Afriko devos loĝi en la apudmaraj terstrioj, kaj la interno fariĝos vasta senarba, senakva dezerto.

Nov-Zelando estas lando, kiu dume fariĝis riĉa kaj prospera per ekspluatado de la vastaj arbaroj. La restantaj arbar-terenoj ekzistas nur pro tio, ke la lignistoj opiniis la lignon neutila aŭ neatingebla ekonomie. Ili tamen servas sian utilegan funkcion distribui kaj konservi pluvon kaj degelantajn neĝojn kaj konservi la naturan cirkuladon de akvo en la tero. En iuj lokoj tamen,

laŭ D-r  
la forla  
iujn lol  
de hor  
faritajn  
reforsti  
akvon l  
kaj fik  
en Golf

La la  
progres  
nedetru  
atingis  
La las  
formo  
erozio.  
kiel la l  
aparter  
avanta  
klimato  
estetika  
arbaris  
kaj nu  
ĝiaj gro  
ekzemp  
siaz arb  
de arbo  
Danlan  
sanĝis e





laŭ D-ro E. Marsden, erozio jam komenciĝis kaj la forlavado de grundo en la maron minacas lasi iujn lokojn *kadukaj skeletoj*. La nova generacio de homoj devas ripari la difektojn senpense faritajn de la prapatroj. Oni devas intense reforsti\* la naturdrenajn deklivojn por konservi akvon kaj tiel malhelpi la danĝeron de superakvigoj kaj *fiksi* la grundon, nun forirantan en la riveroj en Golfon Poverty.

La landoj de Meza Eŭropo ilustras, kiel la homo progresse kaj klare uzis la teron tra la jarcentoj nedetruinte ĝin. Tie la arto de arbokulturo atingis sian plej altan kaj plej intensan aplikadon. La lasta milito tamen postlasis cikatrojn en formo de malgrandigitaj arbaroj kaj eventuala erozio. Inter arbaristoj Germanujo estas akceptita kiel la hejmo de la arbarkulturo, sed al la Francoj apartenas la merito, unue rekonii la nerektajn avantaĝojn de arbaroj, ekzemple la rilaton kun klimato, la akvo-konservajn valorojn. Aŭstra arbarismo venis sub la influon de Germanaj ideoj, kaj nun suferas pro troa unuspeca kulturo kaj ĝiaj grenstepoj degeneras. Belgujo estas bonega ekzemplo de lando, kiu ĉiam havis intereson pri siaj arbaroj, kaj Nederlando konstatis la valoron de arboj ĉe la polderigo† de submaraj terenoj. Danlando *fiksas* nestabilajn sabloterenojn kaj sangis erikejojn en valorajn arbarojn. La multaj

\* forsti = sisteme planti arbojn.

† poldero = tero gajnita el la maro.

betularbaroj estas agrabla trajto de la Dana prejzaĝo, en kiu ili grandegas. Svedlando kompreneble estas unu el la plej arboriĉaj landoj en la mondo kaj la arbaroj estas inter la ĉefaj industrioj. Norvegujo sisteme prilaboras siajn arbarojn kaj atentis forstadon. Tamen eĉ tie oni povus multe plibonigi la situacion ĉar 75% de la lando estas neuzebla alimaniere. Finnlando—lando de lagoj kaj arbaroj—disponas pri 50% de arbarterenoj. En Ĉeĥoslovakujo mi admiris la arbarkulturon ĉar tie la arbaristoj dum jardekoj sukcesis konservi ŝirmon sur la ventskurĝitaj montoj kaj altaĵoj. La bordoj de la Meza Maro iam estis la plej dense loĝataj en la mondo, sed la vastaj arbaregoj, iam la efektiva fundamento de la bonfarto de multege da homoj, malaperis de la montoj kaj altaĵoj lasante post si nudajn rokajn pintojn kaj bretojn. Manke de politika stabilo kaj pro ripetigantaj militoj, la landoj de la Meza Maro iom post iom perdis siajn arbarojn. Norda Afriko spertis senindulgan ekspluatadon de lignoprovizo kaj la enlanda dezertigo prezentas defion al la ter-kuracistoj de la estonteco.

La Sovet-Unio havas la plej grandan arbarareon en la mondo. Malgraŭ tio, grandaj pecoj suferas de grundo-degeneriĝo. La registaro tamen jam devigis sin al gigantaj planoj por forstado kaj regajno de kulturebla tero. La Rusoj estis la unuaj, kiuj studis la fundamentajn principojn de reguligo de erozio. Tia estis la sukceso, kiu sekvis la unuajn plantadojn de arboj por konstrui



Sirmilo plantita antaŭ 14 jaroj sur la farmbieno de Kenneth Grazier, Leelanau County, Michigan, Usono.





Sirmilo sur la farmbieno de Ed. Zokel, Box Butte County, Nebraska Usono. La arboj estas de diversaj specoj 4-jaraĝaj

ŝirmzonojn, faratajn de la enmigrintoj en la stepregiono, en la frua deknaŭa jarcento, ke oni entreprenis vastegajn kaj amplekseajn plantadojn inter 1880 kaj 1886, kaj speciala Registara Komisiono estis starigita por studi forstadon. La programo de tiu komisiono estis: ŝirmo de terenoj per konstruo de arbarzonoj, protekto al maturiĝanta greno, distribuo kaj konservo de neĝo, natura cirkuligo de akvo en la aero kaj tero, modifado de temperaturo, altiĝo de pluvo, kultivado de neuzitaj teroj, reguligo de erozio kaj sabliĝo.

Jaro jam pasis de kiam la Konsilio\* de Ministroj de la Sovet-Unio kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de la Sovet-Unio eldonis sian historian dekreton pri la plano de protekta forstado, kaj ĵusaj raportoj indikas, ke la programo de plantado jam estas antaŭ la hortabelo. Dudek mil forstaj partioj jam laboras kaj miloj da forstistoj estas edukataj en kvindek lernejoj. Diskuttrondoj okazas ĉe ĉiuj kolektivaj farmejoj dum la vintro, kaj farmistoj estas edukataj pri la valoro de arbaroj, ne nur kiel ornamaĵoj de la tero, sed kiel necesega vesto. Ili lernas, ke arbaroj estas ne nur fonto de krudaj materialoj, sed grandegaj naturaj laboratorioj produktantaj oksigenon kaj absorbantaj venenajn gasojn kaj polvon. La Soveta popolo komprenas,

\* Konsilio = Konsilantaro aŭ estraro (Angle : *council* ; France : *conseil*).

ke la arbaroj estas iliaj naturaj aliancanoj en la batalo por riĉaj rikoltoj, ke arbaroj konservas malsekaĵon, garantias plenajn riverojn, mildigas la klimaton, kaj haltigas la varmegajn sekajn ventojn. La homoj estas edukataj al la fakto, ke arbaroj agas kiel kondensiloj por ĉiuj formoj de malsekaĵo, roso, nebulo, frosto, kiel ankaŭ neĝo kaj pluvo, kaj ke en arbaroj kaj la ĉirkaŭaĵo akvo troviĝas multe pli proksime de la surfaco ol en senarbaraj regionoj, kaj tiel konservas la sanon de la tero.

En ĉiuj programoj de plantado necesas elekti taŭgajn arbojn de diversaj specoj. La formo de la radikoj estas grava.

En Britujo la societo Homoj de la Arboj estas en la avangardo de la movado por forstado kaj grundkonservado. Tiu organizaĵo rekomendis, ke ĉie ekzistu armeoj pretaj por necesaj kaj urĝaj taskoj de arbarkulturo. La problemo estas tiel grava kaj universala, ke ĝi efektive postulas universalan konsideron kaj universalan klopodon. La lando, kiu iniciatos klopodojn en tiu direkto faros kontribuon al la mondpaco eble pli solidan kaj pli daŭran ol oni nunmomente povas percepti.

Libere resumita kaj tradukita de M.S. Kun permeso de la aŭtoro ĉe *Men of the Trees*, The Gate, Abbotsbury, Dorset, Anglujo, al kiu ni ŝuldas dankon pro la kliŝoj ilustrantaj ĉi tiun artikolon.

Prof. D

La vo  
fari la  
penado  
S-ro M  
entrepr  
geesper  
de la d  
kastelo  
sesdek  
persona  
multno  
lerneja  
ĉambro  
interes  
institut  
menciin  
verkist  
pri la I

Anst  
Anstat  
eble, ĝ  
ĝuste,  
komun  
mondo  
rekonfi  
graveco

Esta  
kaj mi  
nacion  
morga  
da per  
person  
aŭskul  
interpa  
aŭdiĝis  
Lingvo  
estas  
rondoj  
de labo  
kaj ka  
vere la  
ili plen

Ne e  
interes  
ĉirkons  
skribas  
patoso  
intelek  
malmu  
Eĉ se  
pri Esp  
havas  
entute



Prof. D-ro I. Lapenna :

## NIA FORTO KAJ NIA MALFORTO

La vojaĝo tra Francujo finiĝis. Oni povus nun fari la unuan bilancon. Paroli ekzemple pri la penadoj de U.E.A. kaj precipe de ĝia prezidanto, S-ro Malmgren, kiu iniciatis tiun ĉi gravan entreprenon; akcenti la helpemon de la francaj geesperantistoj; priskribi la ĉarmojn multflankajn de la diversaj regionoj, pitoreskaj urboj, antikvaj kasteloj. Oni povus ankaŭ detali la statistikon: sesdek kvar prelegoj, centoj da afiŝoj, miloj da personaj invitiloj, pli ol cent gazetartikoloj, multnombraj personaj kontaktoj kun urbestroj, lernejoj, inspektoroj, funkciuloj de komercaj ĉambroj kaj turisma servo. Sendube estus interese raporti pri la solenaj akceptoj en diversaj institucioj, ekzemple en Perpignan. Nepre menciindaj estus la diversaj opinioj de scienculoj, verkistoj, universitataj profesoroj, artistoj, k.t.p. pri la Internacia Lingvo . . . .

Anstataŭ rakonti tamen, mi prefere resumos. Anstataŭ priskribi, mi penos analizi kaj, se iel eble, ĝeneraligi. Ne temas pri Francujo aŭ, pli ĝuste, nur pri Francujo. Temas pri kelkaj trajtoj, komunaj al la Esperanto-movado en la tuta mondo. La sperto ĵus akirita en Francujo nur rekonfirmas ilian ekziston, aktualecon kaj . . . . gravecon.

### I.

Estas necese komenci per ripeto de fakto konata kaj milfoje dirita: **la homaro bezonas la Internacian Lingvon.** Hodiaŭ pli multe ol iam. Kaj morgaŭ ankoraŭ pli multe ol hodiaŭ. Kun centoj da personoj apartenantaj al ĉiuj socitavoloj mi persone parolis pri la afero; miloj da aliaj aŭskultis la prelegojn. Tamen nek en personaj interparoloj, nek dum diskutoj post la prelegoj, aŭdiĝis p. incipa voĉo kontraŭ la Internacia Lingvo. Kontraŭe, la ĝenerala opinio estas: ĝi estas nepre necesa aŭ almenaŭ tre utila. En rondoj intelektulaj, precipe sciencistaj, en rondoj de laboristoj kaj oficistoj, eĉ en rondoj de farmistoj kaj kamparanoj oni ripetis la samon! Ĝi estas vere latentata sento de la amasoj. Sento pri kiu ili plene konsciigas tuj kiam oni ektuŝas ĝin.

Ne estas, do, vero, ke *hodiaŭ la homoj ne havas intereson pri la Internacia Lingvo aŭ ke la hodiaŭaj cirkonstancoj ne favoras ĝin*, kiel ofte opinias kaj skribas kelkaj niaj amikoj kun certa rezignacia patoso. Estas kontraŭe vero, ke la amasoj kaj la intelektaj elitoj tro malmulte, sed fakte tro malmulte, konas la solvon de la lingva problemo. Eĉ se oni povas konstati, ke la publiko *ion aŭdis* pri Esperanto, oni tuj povas ankaŭ konstati, ke ĝi havas nur treege nebulan koncepton. Se oni entute ion opinias pri Esperanto, tiam ĝenerale oni

taksas ĝin tre malalte el lingva vidpunkto. Eĉ la homoj, kiuj rilatas al ĝi kun simpatio, konsideras ĝin lingvo primitiva, netaŭga por esprimi pli subtilajn pensunuojn. Kaj pri fakta ŝtato kulpas nek la *hodiaŭaj cirkonstancoj* nek la *apatio de la publiko* sed **nur ni mem.** Pri tio ni bone konsciu, se ni vere deziras progresigi nian aferon.

La dua grava fakto, unuavide same tiel banala kiel la unua, estas, ke la lingvo bone funkcias. En la jaro 1902 venis en Parizon sveda Esperantisto. La parizaj geesperantistoj povis paroli kun li en la Internacia Lingvo. Pri tiu *miraklo* tiama *La Esperantisto* skribis plurajn sinsekvajn artikolojn! Hodiaŭ troviĝas ne nur en Parizo, sed eĉ en malgrandaj vilaĝoj, multaj homoj, kiuj kapablas ne nur interkompreniĝi, sed eĉ sen preparo traduki malfacilajn prelegojn kaj paroladojn. Hodiaŭ ekzemple en Francujo estas konsiderinda nombro da infanoj, kiuj senĝene kaj flue parolas la Internacian Lingvon. Kaj pri tio ni ne skribas fruntartikolon!

Lingvo, en kiu petolas bubeto, en kiu kungenie reaperas la penso de Shakespeare aŭ de Danté, per kiu luktas laboristo aŭ defendas sian sciencan teritorion intelektulo, lingvo de ĉiutagaj bagateloj kaj de profundaj emocioj—tia lingvo sufiĉe pruvus sian vivkapablecon.

Ne estas do vero, ke la strukturo de la lingvo mem aŭ iaj ĝiaj akcesoraĵoj, ekzemple la super-signoj, kaŭzis ĝian nesufiĉan disvastiĝon, kiel tion opinias kelkaj niaj amikoj, cetere iom nervozaj kaj ambiciemaj. Estas kontraŭe vero, ke bedaŭrinde ne ĉiuj *fervoraj* Esperantistoj komprenis la gravecon de ĝisfunda ellerno de la lingvo, unuflanke, kaj ĝiajn sociajn signifon, pozicion kaj rolon, aliflanke. Tial inter ni troviĝas ankaŭ personoj, kies lingvoscio ne transpaŝas la limojn de konvenciaj salutoj. Tial, krom la vere talentaj poetoj kaj verkistoj, ni posedas ankoraŭ sufiĉan kvanton da *poetoj*. Tial fine ne estas maloftaj diversaj *reformistoj*, *plibonigistoj* kaj similaj *istoj* (ignoranteco patrinatas arogantecon!), kiuj per siaj senrespondecaj agoj malutilas al la afero pli ol oni kutime supozas. Ankaŭ pri tiu ŝtato kulpas nur ni mem, nia indulgemo, nia pardonemo rilate al ĉio (eĉ se ĝi estas la plej stulta), kio okazas *sub la verda signo*.

### II.

Kie do estas la solvo?

De unu flanko ekzistas la bezono, de la alia flanko ekzistas perfekta rimedo por kontentigi la bezonon! Tiuj du faktoj estas niaj du plej fortaj punktoj. Komprenoble, ni disponas ankaŭ pri sufiĉe da agemaj kaj sinoferemaj unuopuloj, ni



Prof. D-ro I. Lapenna :

## NIA FORTO KAJ NIA MALFORTO

La vojaĝo tra Francujo finiĝis. Oni povus nun fari la unuan bilancon. Paroli ekzemple pri la penadoj de U.E.A. kaj precipe de ĝia prezidanto, S-ro Malmgren, kiu iniciatis tiun ĉi gravan entreprenon; akcenti la helpemon de la francaj geesperantistoj; priskribi la ĉarmojn multflankajn de la diversaj regionoj, pitoreskaj urboj, antikvaj kasteloj. Oni povus ankaŭ detaligi la statistikon: sesdek kvar prelegoj, centoj da afiŝoj, miloj da personaj invitiloj, pli ol cent gazetartikoloj, multnombraj personaj kontaktoj kun urbestroj, lernejoj, inspektoroj, funkciuloj de komercaj ĉambroj kaj turisma servo. Sendube estus interese raporti pri la solenaj akceptoj en diversaj institucioj, ekzemple en Perpignan. Nepre menciindaj estus la diversaj opinioj de scienculoj, verkistoj, universitataj profesoroj, artistoj, k.t.p. pri la Internacia Lingvo . . . .

Anstataŭ rakonti tamen, mi prefere resumos. Anstataŭ priskribi, mi penos analizi kaj, se iel eble, ĝeneraligi. Ne temas pri Francujo aŭ, pli ĝuste, nur pri Francujo. Temas pri kelkaj trajtoj, komunaj al la Esperanto-movado en la tuta mondo. La sperto ĵus akirita en Francujo nur rekonfirmas ilian ekziston, aktualecon kaj . . . .

### I.

Estas necese komenci per ripeto de fakto konata kaj milfoje dirita: **la homaro bezonas la Internacian Lingvon**. Hodiaŭ pli multe ol iam. Kaj morgaŭ ankoraŭ pli multe ol hodiaŭ. Kun centoj da personoj apartenantaj al ĉiuj socitavoloj mi persone parolis pri la afero; miloj da aliaj aŭskultis la prelegojn. Tamen nek en personaj interparoloj, nek dum diskutoj post la prelegoj, aŭdiĝis principa voĉo kontraŭ la Internacia Lingvo. Kontraŭe, la ĝenerala opinio estas: ĝi estas nepre necesa aŭ almenaŭ tre utila. En rondoj intelektulaj, precipe sciencistaj, en rondoj de laboristoj kaj oficistoj, eĉ en rondoj de farmistoj kaj kamparanoj oni ripetis la samon! Ĝi estas vere latentanta sento de la amasoj. Sento pri kiu ili plene konsciigas tuj kiam oni ektuŝas ĝin.

Ne estas, do, vero, ke *hodiaŭ la homoj ne havas intereson pri la Internacia Lingvo* aŭ ke *la hodiaŭaj cirkonstancoj ne favoras ĝin*, kiel ofte opinias kaj skribas kelkaj niaj amikoj kun certa rezignacia patoso. Estas kontraŭe vero, ke la amasoj kaj la intelektaj elitoj tro malmulte, sed fakte tro malmulte, konas la solvon de la lingva problemo. Eĉ se oni povas konstati, ke la publiko *ion aŭdis* pri Esperanto, oni tuj povas ankaŭ konstati, ke ĝi havas nur treege nebulan koncepton. Se oni entute ion opinias pri Esperanto, tiam ĝenerale oni

taksas ĝin tre malalte el lingva vidpunkto. Eĉ la homoj, kiuj rilatas al ĝi kun simpatio, konsideras ĝin lingvo primitiva, netaŭga por esprimi pli subtilajn pensunuojn. Kaj pri fakta ŝtato kulpas nek la *hodiaŭaj cirkonstancoj* nek la *apatio de la publiko* sed **nur ni mem**. Pri tio ni bone konsciu, se ni vere deziras progresigi nian aferon.

La dua grava fakto, unuavide same tiel banala kiel la unua, estas, ke la lingvo bone funkcias. En la jaro 1902 venis en Parizon sveda Esperantisto. La parizaj geesperantistoj povis paroli kun li en la Internacia Lingvo. Pri tiu *miraklo* tiama *La Esperantisto* skribis plurajn sinsekvajn artikolojn! Hodiaŭ troviĝas ne nur en Parizo, sed eĉ en malgrandaj vilaĝoj, multaj homoj, kiuj kapablas ne nur interkompreniĝi, sed eĉ sen preparo traduki malfacilajn prelegojn kaj paroladojn. Hodiaŭ ekzemple en Francujo estas konsiderinda nombro da infanoj, kiuj senĝene kaj flue parolas la Internacian Lingvon. Kaj pri tio ni ne skribas fruntartikolon!

Lingvo, en kiu petolas bubeto, en kiu kungenie reaperas la penso de Shakespeare aŭ de Danté, per kiu luktas laboristo aŭ defendas sian sciencan teritorion intelektulo, lingvo de ĉiutagaj bagateloj kaj de profundaj emocioj—tia lingvo sufiĉe pruvis sian vivkapablecon.

Ne estas do vero, ke la strukturo de la lingvo mem aŭ iaj ĝiaj akcesoraĵoj, ekzemple la super-signoj, kaŭzis ĝian nesufiĉan disvastigon, kiel tion opinias kelkaj niaj amikoj, cetere iom nervozaj kaj ambiciemaj. Estas kontraŭe vero, ke bedaŭrinde ne ĉiuj *fervoraj* Esperantistoj komprenis la gravecon de ĝisfunda ellerno de la lingvo, unuflanke, kaj ĝiajn sociajn signifon, pozicion kaj rolon, aliflanke. Tial inter ni troviĝas ankaŭ personoj, kies lingvoscio ne transpaŝas la limojn de konvenciaj salutoj. Tial, krom la vere talentaj poetoj kaj verkistoj, ni posedas ankoraŭ sufiĉan kvanton da *poetoj*. Tial fine ne estas maloftaj diversaj *reformistoj*, *plibonigistoj* kaj similaj *istoj* (ignoranteco patrinas arogantecon!), kiuj per siaj senrespondecaj agoj malutilas al la afero pli ol oni kutime supozas. Ankaŭ pri tiu ŝtato kulpas nur ni mem, nia indulgemo, nia pardonemo rilate al ĉio (eĉ se ĝi estas la plej stulta), kio okazas *sub la verda signo*.

### II.

Kie do estas la solvo?

De unu flanko ekzistas la bezono, de la alia flanko ekzistas perfekta rimedo por kontentigi la bezonon! Tiuj du faktoj estas niaj du plej fortaj punktoj. Komprenoble, ni disponas ankaŭ pri sufiĉe da agemaj kaj sinoferemaj unuopuloj, ni



jam havas seriozajn organizaĵojn, ni tenas firme la pozicion en kelkaj radiostacioj, k.t.p. Ĉio ĉi sendube reprezentas la fortajn flankojn de nia movado hodiaŭ. Sed esencaj estas la du menciitaj faktoj. Sekve la fundamenta problemo estas: kiamaniere efike rilatigi ilin?

Temas evidente pri afero tre simpla: doni la rimedon al tiuj, kiuj ĝin bezonas. Tamen analizante la demandojn nur iom pli profunde, oni renkontas malfacilaĵojn. Gravas, nome, kaj la maniero laŭ kiu oni prezentas la lingvon, kaj la personoj kiuj ĝin prezentas, kaj la medioj al kiuj oni ĝin prezentas. Eĉ pli: gravas la karaktero kaj grado de organiziteco de la movado, la ĝenerala klareco de ĝiaj membroj, ilia nombro, la nivelo de ilia lingvoscio, la rolo kiun ili ludas en sia medio (ni ne forgesu, ke oni kutimas juĝi la aferojn pli multe laŭ la personaj kvalitoj de iliaj portantoj, ol laŭ ilia interna valoro!).

Rilate al ĉiuj ĉi punktoj ni, bedaŭrinde, ankoraŭ lamas. Niaj bazaj organizaĵoj, nome la societoj, preskaŭ ne ekzistas. En tuta Francujo mi ekzemple vidis nur unu veran societon kun propra ejo, kun propraj biblioteko, leĝejo, kursejo k.t.p. (Romans). La grupoj, kiuj cetere estas terure malriĉaj (kelkfoje la jara kotizo proksimume egalas al eksterlanda afranko de letero), kunvenas plejparte nur unufoje en la monato. Kutime oni parolas nacilingve, ĉar pro nesufiĉa praktikado la konversacio en la Internacia Lingvo prezentas por la plimulto sufiĉajn malfacilaĵojn. Estante plejparte nedinamismaj, niaj grupoj ne altiras novajn fortojn. Sekve ili ĉiam pli kaj pli fariĝas fermitaj, preskaŭ familiaj rondoj. Rigardataj elektstere ili lasas la impreson pli multe de iaj sektoj, ol de kulturaj societoj. Tial ofte la publiko rigardas al ili kun certa malŝato aŭ almenaŭ malkonfido. Plua sekvo estas, ke la Esperantistoj, kiuj laŭ siaj kapabloj povus esti la plej utilaj en la societo, retiriĝas kaj vivas izolite de la grupo. Ofte ili forlasas entute la movadon.

Koncerne la propagadon, la afero prezentigas ankoraŭ pli malhele. Pri la multnumbraj demandoj koncernantaj la propagandan agadon, oni preskaŭ neniam diskutas. Ĉiu laboras laŭ sia plaĉo kaj bontrovo, ofte tute fuŝe. Por fariĝi ŝuisto aŭ kudristino aŭ por praktiki kiun ajn metion oni devas lerni ĝin kaj ekzameniĝi. La diskonigo kaj la instruado de Esperanto estas pli ol metio. Tamen por publike aktivi por la Internacia Lingvo sufiĉas surmeti la verdan stelon! Ni, kompreneble, havas multajn lertajn agantojn por nia afero, sed unue ilia laboro ne estas plene harmoniigita, kaj due ankoraŭ abundas fuŝuloj, kies malutilan agadon neniu malhelpas. Kaj, bedaŭrinde ankoraŭfoje, tiuj ĉi lastaj estas ofte pli laŭtaj kaj pli videblaj ol la

unuaj. Ĉar unu fuŝulo povas pli detrui ol cent seriozaj homoj povas konstrui, kaj ĉar la fakta rilato inter tiuj du kategorioj en nia movado estas pli favora al la unua tipo ol nur 1%, tial ni ne miru, ke la publiko havas—modeste dirite—tre nebulan koncepton pri la afero!

Jen, tie kuŝas nia malforto: troa individuismo; manko de memdisciplino kaj organiziteco; manko de veraj, funkciantaj societoj; manko de fortaj kaj aktivaj propagandaj centroj; manko de profunde ellaborita laborplano.

\* \* \*

Esperanto vivas kaj sendube vivos pluen. Sed, se ni fakte volas eliri el la nuna *ensorĉita cirklo*, ni devas plej energie solvi ĝuste tiujn ĉi neŭralgiajn punktojn. Radikale!

Eble oni respondos: vane vi postulas de iu dolaron, se li havas en la poŝo nur cendon. Korekta respondo, se ni fakte disponus nur pri cendo. Sed mi opinias, ke el vidpunktoj nombra, intelekta, kultura, klareca kaj eĉ el vidpunkto de entuziasmo, nia movado en ĉiu okazo havas pli ol cendon, kvankam eble ne tutan dolaron! Kaj tio sufiĉas por ion atingi. Necesas nur voli. Ni klopodu realigi almenaŭ la unuan paŝon dum la Pariza Kongreso!

(Prof. D-ro Lapenna laŭ sia kutimo uzis ĉe landnomoj la finaĵon *-io*. Por konformigi la uzon kun nia ĝenerala principo ni aliĝis tion al *-ujo*.—Red.)

**La Germana Muzeo en München.** Tiu muzeo (*Deutsches Museum*, ne identa kun la *Germanische Museum* en Nürnberg) fondita de Oskar von Miller, certe estas la plej granda elmontro de la historia evoluo de la natursciencoj kaj tekniko. Ĝi jam povis restarigi la sekcion pri la fiziko. En proksimume 30 salonoj kolektiĝis la sekcioj astronomio, mekaniko, varmo, elektro, telegrafio, optiko, akustiko kaj muzikinstrumentoj, ĉio kun plej valoraj originalaparatoj kaj maŝinoj.

**Rusa Presarto.** Pasis jam 375 jaroj de kiam komenciĝis en tiama Rusujo la rusa presarto. Pro tio en Kievo diversaj manifestacioj okazis, inter ili ekspozicio de libroj, kiuj elmontras la unuajn tipografe presitajn librojn rusajn. Inter tiuj libroj troviĝas ekzemple la verko *La apostoloj* presita en 1574 en Lvov, kaj la *Biblio de Ostrog* presita en 1581 en la urbo Ostrog, (Volinio). Ambaŭ librojn eldonis la unua rusa presisto Ivan Federov.

**Al altaro de Dio!** Katolika preĝlibreto en Esperanto. Komp. kaj prilaborita de L. Thalmaier. Eldonejo Katolika Esp. Centro en Germanujo, München 13, Mittermayrstr. 18, Germ., prezo 4 rpk.

**Internacia Logaritmo-Tabelaro** kompilita de D-ro H. Wagner. Havebla ĉe G.E.A. Engerlbertstr. 7, München-Pasing (13b) Germ. Prezo 3 rpk.

**Esperanta Mur-kalendaro**; prezo 50 fr.fr. ĉe S-ro Bourguignon, Lannemezan (Hte. Pyr.) Francujo.

(noto de S-ro

La r subjek sed ne

Tan kompi Ekzer

(a) Si est

(b) taŭga lokon. (Prov

(c) refleksi

(d) pronon por (=ke

Sim Zame idiotis aŭ eĉ Respo de tiu

Zar en ĝia Lev. iliaten

Pre Biblia (refleksi Laŭe, (ekzer ĉe No difere Ĉion logika signif

Pri disku Zame ĝin fa letero emine morti hezitu por (apar tradu la ins konfo



**Pri "si"**

(notoj de S-ro M. C. Butler, komplemente al la artikolo de S-ro Rust *Esperanto* p. 9).

La refleksiva pronomo *si* rilatas al la triapersona subjekto de la frazo (aŭ subfrazo) en kiu ĝi staras, sed ne estas mem subjekto. Konsentite!

Tamen iufoje *si* ne estas refleksiva. Tiam, kompreneble, la supra regulo ne estas aplikebla. Ekzemple:

(a) En la frazo *Si estas refleksiva pronomo* *Si* estas substantivo, subjekto de la frazo.

(b) Iufoje *sia*=*la propra* (*ĝusta, konvena, taŭga*), sen ideo refleksiva. *Metu ĉion en sian lokon. Sia (la propra) estas kara, pli ol najbara* (Prov. 765). *Ĉio sia estas plej ĉarma* (Prov. 357).

(c) Ĉe klišaj esprimoj: *inter si, per si mem*, sen refleksiva ideo. *Ili parolis inter si*.

(d) Kunmetaĵo kun prefikso *sin-* ne estas pronomo. *Lia sinamo* (=la amo, kiun li havas por *si*: subjekto) *estas granda. Sinprotekto* (=ke oni sin protektu) *estas instinkto*.

**Siatempe**

Simile, la esprimojn *siatempe*, en *sia tempo* Zamenhof kutime uzis ne refleksive, sed iom idiotisme, kun la signifo *propratempe, ĝustatempe* aŭ eĉ *tiutempe*. Vidu liajn vortojn en *Lingvaj Respondoj* p. 59. Mi posedas pli ol 80 ekzemplojn de tiu uzado. Ekzemple Nom. 23/23.

Zamenhof ankaŭ uzis tute normale en *sia tempo*, en *ĝia tempo*, en *ilia tempo* (ekzemple El. 13/10, Lev. 23/4). Sed ĉu li mem uzis ankaŭ *ĝiatempe, iliatempe*?

Pretigante la Biblian tekston por la presisto, la Biblia Komitato faris distingon inter *siatempe* (refleksiva) kaj *miatempe, ĝiatempe, iliatempe*. Laŭe, ili aliigis kelkajn *siatempe*-ojn de Zamenhof (ekzemple Pred. 3/11, Lev. 26/4, Cef. 3/8). Tamen ĉe Nom. 23/23 restas *siatempe*! Tiunmaniere ili diferencigis inter *Ĉion Li kreis bela Siatempe* kaj *Ĉion Li kreis bela ĝiatempe*. Tiu distingo estas logika kaj klara, sed ĝi perdigas la idiotisman signifon *ĝustatempe*.

Pri la konsilindeco de tiu ŝanĝo mi ne intencas diskuti. Tre certe, laŭ la mandato donita de Zamenhof mem, la Biblia Komitato plene rajtis ĝin fari. Sed ili ne estis unuanimaj. Mi posedas leterojn de du el la komitatanoj, ambaŭ homoj tre eminentaj kaj ĝisoste fidindaj: ambaŭ nun mortintaj. Ĉar la leteroj estis *konfidencaj*, mi hezitus ilin publikigi. S-ro X insistis pri la ŝanĝo, por klareco, konsekvenceco, unuformeco, kaj (aparte) pro tio, ke Z. mem en siaj lastaj Bibliaj tradukoj skribis *ĝiatempe* kaj *liatempe*. Nu, laŭ la instrukcio de Z. mem, la komitato havis devon konformigi la pli fruajn tradukojn al la pli matura

stilo de la lastaj tradukoj. Ekzemple, en siaj lastaj tradukoj Z. skribis *grego, tribo, kultivi* anstataŭ *ŝafaro, gento, kulturi* kaj la komitato laŭe enkondukis tiujn radikojn en la plej fruajn tradukojn ankaŭ. S-ro Y tamen ne konvinkigis, ke Z. vere skribis *ĝiatempe, iliatempe*, kiel asertite. Nur trastudo de la tuta originala teksto povus tion decidi.

Ĉi tie mi nur atentigas, ke kun la idiotisma signifo *ĝustatempe* la esprimo *siatempe* ne estas refleksiva.

**Danki por, Danki pro**

Ambaŭ estas Zamenhofaj. Ambaŭ estas bona Esperanto. Plej ofte (kiel diras S-ro Rust) *danki pro* estas preferinda. Kaj ĝi tute ne estas novaĵo. En *The British Esperantist* 1931-2 mi publikigis kelkajn antaŭe nekonatajn dokumentojn sub la titolo *Frua Historio* kaj en Aprilo 1932 (p. 163) leteron de Zamenhof al Londona gazeto *The Office* eldonitan en Feb. 1889 (notu la daton!). En tiu letero Z. skribis: *Mi dankas Vin kore pro Via aminda sendo . . . .*

**EN KELKAJ LINIOJ**

**Lumanta aŭto.** Angla aŭto-fabrikisto sukcesis produkti substancon, per kiu oni farbas aŭton tiel, ke ĝi lumas nokte. La veturilo reflektas la lumon, kiu falas sur ĝin kaj tiel fariĝas videbla de alirantoj. La lumreflektilon oni liveras en diversaj koloroj.

**Muzeo pri ledo.** Offenbach apud Majno estas la loko de la germana ledindustrio. Ĝi posedas muzeon pri la ledo kaj ĝia prilaboro, konsistantan el 14000 objektoj, inter ili, ekzemple, dokumentujo de Colbert, la leda kolumo de Wallenstein, valoraj ŝrankoj por relikvoj k.a. Dum la milito ĉi tiuj trezoroj estis konservataj en ducent kestoj kaj gardataj en sekuraj lokoj. La muzeo denove estas malferma.

**Klimat-ŝanĝigo.** Dum la Kongreso por maresploro en Kopenhago, oni komunikis interesajn faktojn pri la ŝanĝigoj en la klimato sur nia kontinento. Dum la lastaj jardekoj la nordaj regionoj pli kaj pli varmiĝas. Sekve de tiu varmigo atingis Danlandon ekzemple, 25 diversaj specoj de birdoj, kiuj ĝis nun ne troviĝis tie; en Islandon venis 6, kaj al la Farö-insuloj 8 specoj. Antaŭ 20 jaroj oni ne trovis moruojn ĉe la bordoj de Grenlando, sed hodiaŭ ili estas trovataj grandamase. En la akvoj ĉirkaŭ Islando aperis 39 novaj fiŝspecoj. En norda Svedlando malaperas glaciejoj pro la forta somerdegelo kaj la malpliigo de la neĝo dumvintre. En Finnlando oni nun rikoltas tritikon, kie antaŭ kelkaj jardekoj tio ne estis ebla.



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 224

3-an de Februaro 1950

**DELEGITOJ.** Informo pri la multaj aldonoj kaj ŝanĝoj aperos en la jarlibro, kiu espereble eliros antaŭ Pasko.

**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**

- Halldor, S-ro H., Stockholm, Svedujo.
- Tible, S-ro J. M., Saint-Dié, Francujo.
- Falk, S-ro J. L., Pasadena, Cal., Usono.
- Reed, S-ro E., Los Angeles, Cal., Usono.
- Villareal, S-ro M. M., Washington, D.C., Usono.

**PATRONOJ 1950**

- 11. Gillett, S-ino M. C., Banbury, Anglujo.
- 12. Ravestein-Basters, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando

**MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950**

- 94. Rayner, S-ro R. W., Ruiru, Kenjo.
- 95. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
- 96. Hoekma, S-ro A. G., Den Haag, Nederlando
- 97. Denton, S-ino M. T., Borth, Kimrujo
- 98. Robinson, F-ino E., Pickering, Anglujo
- 99. Atkinson, S-ro W. G., Walton-on-Naze, Anglujo
- 100. Bevan, S-ro F. O., Farnborough, Anglujo
- 101. Cunningham, S-ro W., West Wemyss, Skotlando
- 102. O'Dell, S-ro J. D., Lincoln, Anglujo
- 103. Ducommun, S-ro E., Les Brenets, Svislando
- 104. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
- 105. Mila, S-ro E., Drancy, Francujo
- 106. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo
- 107. Perrin, S-ro A., Paris, Francujo
- 108. Petit, S-ro P., Rosny-sous Bois, Francujo
- 109. Aleman Ruiz, D-ro A., Habana, Kubo.
- 110. Ridpeth, S-ro T. H., London, Anglujo
- 111. Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando
- 112. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando
- 113. Schooleman, S-ro J., Rotterdam, Nederlando
- 114. Rydlewski, S-ro M., Łódź, Pollando
- 115. Dratwer, S-ro J., Warszawa, Pollando
- 116. Slatyński, S-ro F., Oswiecim, Pollando
- 117. Borys, S-ro A. B., Katowice, Pollando
- 118. Garbar, S-ro J., Wrocław, Pollando
- 119. Malek, S-ro S., Łódź, Pollando
- 120. Miadowicz, Mgr. B., Poznań, Pollando
- 121. Misiewicz, S-ro W., Radom, Pollando
- 122. Odolański, S-ro W., Piotrków, Pollando
- 123. Pieta, Pastro P., Strazów, Pollando
- 124. Popkiewicz, S-ro J., Dziedzice, Pollando
- 125. Pujdak, S-ro J., Łódź, Pollando
- 126. Sadlik, S-ro L., Radom, Pollando
- 127. Tuch, S-ro M., Katowice, Pollando
- 128. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo
- 129. Geers, F-ino B., Heide-Kalmthout, Belgujo
- 130. Magotteaux, S-ro L., Liège, Belgujo
- 131. Staes-v.d. Voorde, S-ino F., Bruxelles, Belgujo
- 132. Ramsey, S-ro C., Devonport, Aŭstralio
- 133. Collins, S-ro E., Hamilton, Ont., Kanado
- 134. Coventry, S-ro W. H., Harpenden, Anglujo
- 135. Crofts, S-ro F. W., Guildford, Anglujo
- 136. Gayfer, S-ro W. T., Cleethorpes, Anglujo
- 137. Schacht, D-ro P., Wellington, Nov-Zelando
- 138. Cuené, S-ro M., Meknés, Maroko
- 139. Ohana, S-ro B. S., Marrakech, Maroko
- 140. Niven, F-ino I. H., Alderley Edge, Anglujo
- 141. Maier, D-ro K., Tientsin, Ĉinujo
- 142. Eisele, S-ro J., St. Louis, Mo., Usono
- 143. Ekstrom, S-ro E., Inglewood, Cal., Usono
- 144. Karlson, S-ro R., Camden, N. J., Usono
- 145. Wolff, F-ino H., San Francisco, Cal., Usono
- 146. Strobl, S-ro P., Bonaké, Franca Orienta Afriko

- 147. Hansen, S-ro E., København, Danujo
- 148. Bereterbide, S-ro F. H., Buenos Aires, Argentino
- 149. Otheguy, S-ro H. C., Buenos Aires, Argentino
- 150. Quiña González, D-ro J. A., Buenos Aires, Argentino
- 151. Shuttleworth, S-ino A. P., Southport, Anglujo
- 152. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
- 153. Jones, S-ro D. R. T., Lampeter, Kimrujo
- 154. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
- 155. Araujo, S-ro G. S. de, Rio de Janeiro, Brazilo
- 156. Braga, S-ro I. G., Rio de Janeiro, Brazilo
- 157. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro, Brazilo
- 158. Coutinho, D-ro L. de A., Belo Horizonte, Brazilo
- 159. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
- 160. Moreira, S-ro J., Rio de Janeiro, Brazilo
- 161. Monkiewicz, S-ro B., Warszawa, Pollando
- 162. Bugajski, S-ro E., Warszawa, Pollando
- 163. Danowski, S-ro W., Warszawa, Pollando
- 164. Jaraczewski, S-ro E., Warszawa, Pollando
- 165. Wojtas, S-ro J., Radom, Pollando
- 166. Zamenhof, S-ro L., Warszawa, Pollando
- 167. Myers, S-ro W. T., Letohatchee, Ala., Usono
- 168. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo
- 169. Tryggvason, S-ro B., Hivammstanga, Islando
- 170. Bellatti, S-ro S., Battle, Anglujo
- 171. Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Anglujo
- 172. Jobbins, F-ino A. F., Tunbridge Wells, Anglujo
- 173. Langman, S-ro D. J., Birmingham, Anglujo
- 174. Lloyd, S-ro J. C., Salford, Anglujo
- 175. Beau, S-ro B., Macon, Francujo
- 176. Dedieu, F-ino J., Toulouse, Francujo
- 177. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo
- 178. Payrebrune, D-ro J., Szamotuly, Pollando

**DONACOJ.** W. Kent 5s., H. Evans 2s., G. L. Preedy 10s., F-ino E. M. Robertson 2s. 6p., F. C. Rudman 5s., W. Cunningham 5s., M. Gouchon 10s., S-ino D. Lencer 15s., F. Mitzschke, F. H. Summer, G. P. Ferree, F. W. Vedder po 7s., T. A. Goldman, J. J. Butler, N. Horowitz, S. T. Norvell, D-rino L. A. DeVilbiss, E. A. Peck, J. M. Clifford, F-ino G. Elliott, H. French, F-ino G. Randolph, R. T. Sandberg, S-ino A. Kincaid, S-ino C. L. Coss, C. N. Ayres, J. H. Schackmann, R. W. Byerly, L. A. Sharpe, S-ino C. P. Thomas, po 3s. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de januaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de januaro 1949.

	1949	1950
Asociaj membroj ..	644	2148
Individuaj membroj :		
MJ ..	270	316
MA ..	1775	2121
MS ..	179	186
Patronoj ..	14	12
DM ..	176	193
HM ..	56	56
	2470	2884
	3114	5032

**Nota :** Oni devus ne kompari la ĉi-suprajn ciferojn kun la ciferoj je la fino de 1949, ĉar ĉiam en January ni rekomencas la numeradon de la membraro. Ĝusta komparo estas ebla nur kun la sama monato en la antaŭa jaro.

C. C. GOLDSMITH Sekretario.



# SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

## ENHAVO

Enkonduko	- - - - -	Rektoro Karl Söderberg, Svedujo
La laponoj kiel kultura popolo	- - - - -	Profesoro B. Collinder
La kimraj artofestoj	- - - - -	R. Rossetti
El la mirinda naturo	- - - - -	C. Stöp-Bowitz
Astronomiaj sensacioj	- - - - -	Profesoro K. Lundmark
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	- - - - -	Profesoro D-ro Ivo Lapenna
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	- - - - -	D-ro P. Neergaard
La kalevala kulturo	- - - - -	Vilho Setälä
Pri la sveda kooperativa movado	- - - - -	Rektoro S. A. Stahre
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	- - - - -	F. Szilagy

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil.    Afranko 2p.  
(17 respondkuponoj)

*Mendu ĉe*

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

## LA INTERNACIAJ FERIAJ E-KURSOJ

en Helsingør, Danlando

okazos 17-24 Julio, sub aŭspicio de UEA.

La kurskomitato invitas ankaŭ vin.

Pasintjare partoprenis 300 el 11 landoj.

Petu senpagan prospekton ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando

## LERNU ESPERANTON

de Daniel Quarello

Katedro de supera kulturo pri Esperanto.

1. Lerne Esperanton.
2. Komplementoj de l'substantivo.
3. Komplementoj de l'verbo.

Prezo aŭfrankite: po 1ŝ. 4p. ĉiu volumeto.

Mendu ĉe U.E.A.



# LIBROJ EL JAPANUJO

## NUN HAVEBLAJ

	ŝ.	d.
<b>Danco de Skeletoj.</b> Ujaku Akita (K. Susuki). Tri teatraĵetoj ..	74 paĝoj, broŝ.	1 9
<b>Enciklopedieto de kulturaj vortoj de Esperanto.</b> Prof. Kawasaki-Naokazu.		
	Vol. 1, 100 paĝoj, broŝ.	3 0
	Vol. 2, 158 paĝoj, broŝ.	5 0
Notu, ke en la Enciklopedieto ĉiuj difinoj estas en la Japana lingvo.		
<b>Granda Lernado kaj Doktrino de Mezeco</b> .. .. .	102 paĝoj, broŝ.	2 0
La unuaj libroj de Konfuciana Biblio, tradukitaj de Kiuiĉi Nohara.		
<b>Legolibro de Esperantaj Fabeloj</b> .. .. .	44 paĝoj, broŝ.	1 3
Kompilis Joŝiŝi Simomura ; Reviziis K. Kalocsay.		
<b>Leteroj el mia muelejo.</b> Alphonse Daudet (Mijake-Ŝihej) ..	80 paĝoj, broŝ.	2 6
<b>La Libro-konstantaĵo de Fila Pieco</b> .. .. .	44 paĝoj, broŝ.	1 3
Esenco de la praktika etiko de Konfuciismo. Tradukita de Kiuiĉi Nohara el Ĉinlingva originalo.		
<b>Medicina Krestomatio,</b> kompilita de Prof. D-ro Hideo Jagi ..	80 paĝoj, broŝ.	2 6
<b>La Sukhavativjuho</b> (Budha sankta skribo). .. .. .	24 paĝoj, broŝ.	1 3
Tradukita de Kiuiĉi Nohara el la sanskrita originalo.		
<b>Verda Parnaso.</b> I.U. Originalaj kaj tradukitaj poemoj .. .. .	128 paĝoj, broŝ.	3 0
<b>Verkoj de D-ro Nakamura.</b> (Sciencaj artikoloj, paroladoj, kaj rakontoj).	108 paĝoj, broŝ.	3 0
<b>Zincoo Sjootoo Ki.</b> Tradukis K. Nohara .. .. .	208 paĝoj, bind.	3 6
La historio de la Japana imperiestra trono.		

Aldonu 10% por afranko

Mendu ĉe

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**